


# EL POPOLA ĈINIO

7  
1977

中國報通





高举毛主席的伟大  
旗帜，紧跟华主席，把  
毛主席开创的无产阶级  
革命事业进行到底！

Geknaboj dancas en parka festa kunveno de la Unua de Majo por varme celebri la eldonon kaj disvendon de la kvina volumo de la «Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong».





Ĝisfine ni kondukos la proletan revolucion aferon komencitan de Prezidanto Maŭ sekvante Prezidanton Hua.



Diversnaciecaj popolanoj varme celebras la eldonon kaj disvendon de la kvina volumo de la «Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong».

Soldatoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo studas la kvinan volumon de la «Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong».




Librejo Hinhua de Pekino dekoraciita





Laboristoj okazigis celebran mitingon sur la konstruejo de la Memora Halo de Prezidanto Maŭ.



Varma celebrado kun granda ĝojo





En parka festa kunveno  
de la Unua de Majo



Infanoj gaje celebras  
la Unuan de Majo.




Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio  
Ĝenerala distribuanto: Guozi Shudian P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

KOVRILO:

Ili ĝoje legas ver-  
kon de Maŭ Zedong.

DORSKOVRILO:


Nokte de la Unua de Majo



Enhavo

Eldono de la kvina volumo de la «Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong» . . . . .	2
Varma celebrado de centoj da milionoj da popolanoj . . . . .	6
Inspekto de Prezidanto Hua al Daking . . . . .	12
Grandioza konferenco de industrio . . . . .	19
Modelo de la ĉina industrio . . . . .	22
Pri la «Ĉarto de la Anŝan-a Fera kaj Ŝtala Kompanio» . . . . .	31
Rememoro pri la Centra Instituto de Kamparana Movado en Vuĉang . . . . .	32
Kadroj devas iri al la plejfronto de agrikulturo . . . . .	36
«Kiel ili similas al Lej Feng!» . . . . .	40
En nova lernoĵaro . . . . .	43
Intervjuo kun J. Ivens kaj M. Lorindan . . . . .	46
Ĉaju . . . . .	49
Manuskripto de martiro Fang Ĝimin . . . . .	50
Malriĉeco . . . . .	52

# Eldono de la Kv «Elektitaj Verkoj



**L**A kvina volumo de la «Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong» estis jam eldonita kaj vendata samtempe en ĉiuj provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de Ĉinio en la 15-a de aprilo.

La kvina volumo estas kompilita kaj eldonita de la Redakta kaj Eldona Komisiono de la Verkoj de Prezidanto Maŭ Zedong sub CK de KPC kun Prezidanto Hua Guofeng kiel ĝia estro, Vicprezidanto Je Gianjing kiel ĝia vicestro kaj ĉiuj membroj kaj membroj-anstataŭantoj de la Politika Buroo de CK de KPC kiel ĝiaj membroj.

La jam aperintaj volumoj 1-4 de la «Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong» entenas ties gravajn verkojn skribitajn en la periodo de la nov-demokratia revolucio. La kvina kaj sekvontaj volumoj entenas gravajn verkojn el la periodo de la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado.

En la kvina volumo de la «Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong» estas kolektitaj gravaj verkoj de la granda gvidanto kaj instruisto Prezidanto Maŭ Zedong el la periodo de septembro de 1949 ĝis 1957 inkluzive. La fondiĝo de la Ĉina Popola



# na Volumo de la de Maŭ Zedong»

Respubliko en 1949 markas fundamentan finiĝon de la nov-demokratia revolucio kaj komenciĝon de la socialisma revolucio. En la nova historia periodo Ĉinio alfrontis la fundamentan problemon, kiun vojon oni iru, socialisman aŭ kapitalisman. En la unuaj ok jaroj post la kapto de la ŝtatpotenco, por konstrui nian landon en socialisman potencon sub diktaturo de la proletaro, Prezidanto Maŭ gvidis nian partion, nian armeon kaj la popolon de nia lando en akra batalo kontraŭ la bienularo kaj burĝaro, la kontraŭpartia alianco de Gaŭ Gang kaj Ĵaŭ Ŝuŝi kaj la reviziisma linio de Liu Ŝaŭki enlande kaj kontraŭ la usona imperiismo kaj la moderna reviziismo de Ĥruŝčov internacie. La kvina volumo de la «Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong» estas registro de la venko kaj scienca resumo de

tiuj grandaj bataloj. En la nova historia periodo de la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado Prezidanto Maŭ sisteme resumis la historiajn spertojn pri la diktaturo de la proletaro de Ĉinio kaj aliaj landoj, analizis la kontraŭdirojn, klasojn kaj klasbatalon de socialisma socio laŭ la fundamenta vidpunkto de materiisma dialektiko: unuiĝo de la kontraŭaĵoj, kaj tiel malkovris la disvolvan leĝon de socialisma socio kaj kreis la grandan teorion pri daŭra revolucio sub la diktaturo de la proletaro. Per la verkoj en la kvina volumo, Prezidanto Maŭ montris al la ĉina popolo la fundamentan vojon por firmigi la diktaturon de la proletaro, preventi kapitalisman restaŭron kaj konstrui socialismon, kaj multe riĉigis la teoriantrezorejon de marksismo-leninismo en filozofio, politika ekonomio kaj scienca socialismo.



*Laboristoj de la 7215-a Presejo de la Kantonaj Trupoj bindas tage kaj nokte la kvinan volumon de la «Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong».*



*ĈPLA-anoj legas la kvinan volumon de la «Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong».*

La unua verko en la kvina volumo estas «La Ĉina Popolo Stariĝis» kaj la lasta estas «Ĉiuj Reakciuloj Estas Paperaj Tigroj». La tuta volumo entenas sume 70 verkojn inter kiuj 46 ne estas publikigitaj en la pasinteco. La verko «La Ĉina Popolo Stariĝis» estas grava historia dokumento proklamanta la fondiĝon de la Ĉina Popola Respubliko. Ĝi difinis la reĝimon de la nova Ĉinio kaj elmetis ĝiajn taskojn en politiko,

ekonomio, kulturo kaj militaj aferoj kaj ĝiajn eksterlandajn politikojn. En verkoj de tiu volumo Prezidanto Maŭ unuafoje elmetis la sciencan tezon pri longdaŭra ekzistado de la batalo inter la proletaro kaj la burĝaro kaj inter la socialisma vojo kaj kapitalisma vojo post fundamenta plenumo de la socialisma transformo de posedsistemo de produktaj rimedoj; la doktrinon pri ĝusta distingo kaj traktado de la du malsamaj kategorioj de kontraŭdiroj en socialisma socio, nome tiu inter ni kaj malamikoj kaj tiu interne de la popolo; la grandan teorion pri daŭra revolucio sub la diktaturo de la proletaro kaj la fundamentajn pensojn pri la ĝenerala linio de la socialisma konstruado. Poste, precipe en la Granda Proleta Kultura Revolucio, li senĉese kompletigis kaj disvolvis tiujn brilajn pensojn surbaze de la spertoj akiritaj dum revoluciaj praktikoj.

La kvina volumo de la «Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong» estas senmorta dokumento de Marksismo-Leninismo. Ĝia eldono estas granda afero tiel en la politika vivo de la ĉina popolo kiel en la historio de disvolvo de Marksismo. Ĝi havas aktualan kaj historian signifon, grandan kaj profundan, tiel por unuigi la penson kaj agon de la popolo de ĉiuj naciecoj de nia lando; por efektiviĝi la strategian decidon de Prezidanto Hua preni klasbatalon kiel la ĉefĉeneron en mas-



*La matricoj de la kvinan volumo de la «Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong» atingis Lasaon.*



La laboristoj kaj ofi-  
cistoj de la Pekina  
Telefona kaj Tele-  
grafia Buroo varme  
celebras la eldonon  
kaj distribuon de la  
«Elektitaj Verkoj de  
Maŭ Zedong».



trumado de la lando; por ĝisfunde malkovri kaj kritiki la “kvarpersonan bandon”; por plifortigi la ideologian konstruadon de la Komunista Partio de Ĉinio; por disvolvi la socialisman revolucion kaj socialisman konstruadon de nia lando, kaj por firmigi la diktaturon de la proletaro; kiel por la internacia komunisma movado kaj la liberigaj aferoj de la subpremataj popoloj kaj subpremataj nacioj de la tuta mondo.

La eldono de la kvina volumo estas frukto de la venko de la Centra Komitato de la Partio estrata de Prezidanto Hua Guofeng super la kontraŭpartia “kvarpersona bando” kaj ankaŭ de la venko de Marksismo super reviziismo. Intencante uzurpi la plej altan gvidpovon de la Partio kaj ŝtato, la “kvarpersona bando” freneze oponis kontraŭ la granda gvidanto kaj instruisto Prezidanto Maŭ kaj Maŭzedongpenso. Per malnoblaj rimedoj ili ĉiamaniere malhelpis kaj subfosis la redaktadon kaj eldonadon de la kvina volumo de la «Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong» kaj provis kapti la gvidadon de tiu laboro. Post la frakaso de la “kvarpersona bando”, la Centra

Komitato de la Partio estrata de Prezidanto Hua alte tenas daŭre la grandan standardon de Prezidanto Maŭ, tuj faris decidon pri eldono de la «Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong» kaj preparado por eldono de la «Verkaro de Maŭ Zedong» kaj plifortigis la gvidadon al la redaktado kaj eldonado de la kvina volumo de la «Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong». Kun senlima respekto kaj amo al Prezidanto Maŭ kaj morta malamo al la “kvarpersona bando” diversnivelaĵaj partiaj komitatoj kaj la vastaj kadraro kaj amasoj de presejoj, distribuejoj kaj aliaj koncernaj fakoj, faris multajn laborojn por kiel eble plej rapide liveri la kvinan volumon al legantoj. La prelistoj tage kaj nokte laboris kaj bonkvalite plenumis antaŭtempe sian taskon. La distribuaj fakoj per plej alta rapideco sendis la kvinan volumon al diversaj lokoj de la vasta lando por garantii la ĝustatempan enmanigon de la libro al la popolo.

La kvina volumo de la «Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong» aperis en populara, broŝurita kaj

bindita eldonoj. Ĝi estos presita en nombro de 200 milionoj da ekzempleroj en diversaj partoj de nia lando. 15 milionoj da ekzempleroj estas jam distribuitaj en la unua fojo.

Nun iras aktiva preparado por eldoni la kvinan volumon en la lingvoj mongola, tibeta, ujjura, kazaha kaj korea por ĉinaj nacimalplimulto kaj ankaŭ en la fremdlandaj lingvoj angla, franca, rusa, japana kaj hispana, kaj baldaŭ aperos tiuj neĉinlingvaj eldonoj. Por kontentigi la bezonon de blinduloj, aperos ankaŭ brajla eldono de la kvina volumo.

En la 7-a de aprilo la Centra Komitato de la Partio faris decidon pri studo de la kvina volumo de la «Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong», por alvoki la tutan partion, la tutan armeon kaj la popolon de ĉiuj naciecoj de la tuta lando serioze studi la kvinan volumon de la «Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong», laŭ la lernostilo de kombino de teorio kun praktiko, por kiu pledis ĉiam Prezidanto Maŭ, kaj profunde malkovri kaj kritiki la kontraŭrevolucionan reviziisman linion de la «kvarpersona bando» per Maŭzedongpenso, klarigi la konfuzon kaj restarigi la inversigitajn pravon kaj malpravon kaŭzitaĵojn de ili en ideologio kaj teorio kaj elimini ilian malbonan influon en diversaj kampoj. Ĝi postulis, ke oni kombinu la studon kun la ordigo de la Partio kaj ĝustigo de laborstilo, plifortigu edukon pri Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso, por ke la vastaj amasoj de partianoj kaj kadroj povu distingi en la batalo Marksisman de reviziismo, ĝustan linion de erara kaj materiisman kaj dialektikon de ideismo kaj metafiziko, altigu politikan konscion kaj reformu sian mondkoncepton. Ĝi alvokis strikte ligi la studon kun la praktiko de klasbatalo, produkta batalo kaj scienca eksperimentado, plenumi la linion kaj politikojn de Prezidanto Maŭ firmigi kaj disvolvi la venkojn de la Granda Proleta Kultura Revolucio, mobilizi la socialisman aktivecon de la kadroj kaj amasoj, bone fari diversajn laborojn, pli kompakte unuiĝi ĉirkaŭ la Centra Komitato de la Partio estrata de Prezidanto Hua, pli alte teni grandan standardon de Prezidanto Maŭ kaj antaŭenmarŝi laŭ la vojo de Maŭzedongpenso por akiri ankoraŭ pli grandajn venkojn.

# Varma Ce da Milio

EN la vespero de la 14-a de aprilo, la Radio Pekino disaŭdigis la novaĵojn pri eldono de la 5-a volumo de la «Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong» kaj la decido de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio pri lernado de la 5-a volumo. Ĝi, kvazaŭ printempa tondro, skuis la tutan Ĉinion. La centmilionoj da popolanoj varme hurais pro tiu granda venko akirita de CK de KPC estrata de Prezidanto Hua Guofeng post faligo de la «kvarpersona bando».

## DE PEKINO ĜIS LA ALIAJ LOKOJ DE LA TUTA LANDO

La tuta Pekino ekbolis de la ĝojiga novaĵo. La vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj varme celebris la eldonon kaj distribuon de la 5-a volumo de la «Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong», tenante ruĝajn flagojn, gongante kaj tamburante. Multaj fabrikoj, minejoj, institucioj, lernejoj kaj popolaj komunumoj okazigis celebrajn kunvenojn kaj kunsidojn por prikanti grandajn kontribuojn de Prezidanto Maŭ kaj paroli pri la granda signifo de la eldono de la 5-a volumo de la «Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong». Oni firme decidis respondi la alvokon de la Centra Komitato de la Partio, bone lerni la verkojn de Prezidanto Maŭ, plene malkovri kaj ĝisfunde kritiki la «kvarpersonan bandon» de Vang Hongven, Ĝang Ĉunkiaŭ, Giang King kaj Jaŭ Venjuan kaj levi novan altan tajdon de la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado.

Hinhua-librejo sur la strato Vangfuging de Pekino dronis en festa atmosfero. Sur la antaŭa muro de la libreja domo pendis horizontale okulfrapa rubando kun la vortoj «Varma Akla-

# Lebrado de Centoj noj da popolanoj

mado de la Eldono kaj Distribuo de la 5-a volumo de la «Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong». Popolamasoj staris en longa vico antaŭ la librejo por aĉeti la 5-an volumon. Multaj homoj tiel ĝojis pro ricevo de ĝi, ke ili eklegis ĝin eĉ sur strato.

En tiu tago, pli ol 400 Hinhua-librejoj, vendejoj de la antaŭurbo kaj agentaj librejoj de kvarta-

laj magazenoj en Pekino, ĉiuj vendis la volumon. Samtempe, en tamburado la ornamitaj kamionoj ŝarĝitaj per la libroj ekveturis unu post alia de la librejoj de ĉiuj distriktoj kaj gubernioj de Pekino kaj sin direktis al fabrikoj, minejoj, popolaj komunumoj, institucioj kaj lernejoj, por ke la vastaj amasoj povu pli frue ricevi ilin. La samo okazis ankaŭ en la urboj Ŝanhajo, Tiangin kaj

*La ĝojiga tago por laboristoj de la Daking-a Olekampo*





Vuhan, en la revoluciaj sanktejoj Ŝaŭŝan, Zunji kaj Jan-an, en altebenaĵaj regionoj Kinghaj, Tibeeto kaj Hingiang kaj sur insuloj ĉe la marbordoj de nia lando.

### FELIĈA REMEMORO

Legante la unuan artikolon kun titolo «La Ĉina Popolo Stariĝis» en la volumo, oni tuj ekmemoris la solenan kaj grandiozan inaŭguron de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko okazigita sur Tian-anmen-placo antaŭ 28 jaroj. Starante sur la majesta Tian-anmen-pordego, la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ solene deklaris al la tuta mondo: Fondiĝis la Ĉina Popola Respubliko! La ĉina popolo stariĝis! En tiu feliĉa momento multaj homoj elverŝis larmojn pro ĝojo, kaj ili kun levita brako laŭte kriis: “Vivu la granda Ĉina Popola Respubliko!” “Vivu la granda Komunista Partio de Ĉinio!” “Vivu la granda gvidanto Prezidanto Maŭ!”

Hodiaŭ, kiam oni vidas la gigantajn ŝanĝiĝojn post la Liberiĝo, ili ĉiuj profunde komprenis: Se ne estus Prezidanto Maŭ kaj la Kompartio, do ne estus la socialisma nova Ĉinio, nek la hodiaŭa feliĉa vivo.




*Diversnaciecaj popolanoj de Pekino en Hinhua-librejo*

En la ĝojigaj tagoj la heroaj Daĝaj-anoj retro-rigardis sian iritan vojon. En la malnova socio, bienuloj de Daĝaj laŭplaĉe tiranis super la kamparanoj, kaj naturaj katastrofoj atakis ilin jaron post jaro. Pro tio, malriĉaj kamparanoj devigite



*Guo Fenglian (dekstre en fronta vico), sekretariino de la partia filio de Daĝaj-brigado, studas kune kun komunumanoj.*



*Konstruantoj de la Memora Halo de Prezidanto Maŭ estas en studo de la kvina volumo de la «Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong».*

vendis siajn gefilojn, fuĝis aliloken aŭ vivtenis sin per almozetado. Post la Liberiĝo, sub la gvido de la partia filio estrata de Kamarado Ĉen Jonggŭj, la Daĝaj-anoj suriris la socialisman vojon montritan de Prezidanto Maŭ kaj ŝanĝis sian malriĉan vilaĝon en prosperan socialisman novan vilaĝon, sin apogante sur la propraj fortoj kaj peneme luktante en malfaciloj. Nun Daĝaj ĉiujare havas superfluan grenon kaj ĉiujare faras kontribuon al nia lando. Guo Fenglian, la nuna sekretario de la partia filio, emociis diris: “En la lastaj pli ol 20 jaroj, dank’ al nia klopodado la socialisma afero de nia Daĝaj ĉiam pli prosperas, kaj la socialisma vojo ĉiam pli larĝas. Ĉiuj niaj venkoj estas venkoj de Maŭzedongpenso. Ni nepre devas daŭre alte teni la grandan standardon de Prezidanto Maŭ kaj grandpaŝe marŝi antaŭen laŭ la socialisma vojo!”

“La ĉina popolo stariĝis!” La mondsdua voĉo de Prezidanto Maŭ ĉiam stimulas la Daking-anojn en la batalo. Hodiaŭ, tenante en siaj-manoj la 5-an volumon, ili rememoris la ardantan petrol-ekspluatan kampanjon en la komenca periodo de konstruado de Daking. Tiam la reviziisma kliko de Ĥruŝĉov perfidis sian promeson, rompis ĉiujn kontraktojn kaj revokis siajn specialistojn,

por submeti la ĉinan popolon al ĝi. Sed, sub la gvido de la Partio, prenante Ferulon Vang Ginhi kiel sian ekzemplon, la heroaj petrolistoj de Daking diligente lernis la brilajn verkojn de Prezidanto Maŭ «Pri Praktiko» kaj «Pri Kontraŭdiro», kaj decidis mem elhaki sian propran industrian vojon. Ili loĝis subĉiele sur la stepo kaj laboris en frosto. Nur post kelkvara klopodado, ili jam forigis la etikedon “Ĉinio malabundas je petrolo”. En la kunsido por celebri la eldonon kaj distribuon de la 5-a volumo de la «Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong», iu membro de la partia komitato de Daking diris: “La venkoj de Daking en la pasintaj 17 jaroj estis akiritaj dank’ al alta tenado de la granda ruĝa standardo de Maŭzedongpenso kaj dank’ al persistado en la socialisma industria linio. Maŭzedongpenso estas heredaĵo postlasita de Prezidanto Maŭ al ni, tial ni nepre devas puŝi antaŭen la amasan movadon de studo de verkoj de Prezidanto Maŭ por akceli rapidan disvolviĝon de diversaj laboroj de la petrol-kampo.

En la ĝojigaj tagoj, la revenintaj elmigrintaj ĉinoj tre emociiĝis. Vang Hianghaŭ estas komitatano de la Filozofia kaj Sociologia Instituto de la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj profesoro de la Gilin-a Universitato. En la jaro 1949 li revenis al la patrolando kaj ekiris sur la revolu-





*La familio de Han Zijong (maldekstre) de Bejhinkiaŭ-strato de Pekino en studo de la kvina volumo*

cia vojo. Ĉeestante la inaŭguran mitingon de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko sur Tiananmen-placo, li aŭskultis la solenan deklaron de Prezidanto Maŭ “La ĉina popolo stariĝis” kaj sentis senkomparajn ĝojon kaj fieron. Hodiaŭ la potenca voĉo de Prezidanto Maŭ kvazaŭ resonas ĉe liaj oreloj kaj donas al li gigantajn inspiron kaj forton. La pli-ol-60-jara profesoro ĝoje diris: “Sub direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, ni intelektuloj suriris la brilan vojon de servo al la popolo. Ni devas diligente studi la verkojn de Prezidanto Maŭ kaj armisian kapon per la granda teorio de Prezidanto Maŭ pri daŭrigo de la revolucio sub la diktaturo de la proletaro kaj ĝisfunde malkovri kaj kritiki krimojn de la ‘kvarpersona bando’ en la frontoj de eduko, scienco kaj tekniko kaj kontribui sian tutan vivon por efektivi la strategian politikon elmetitan de Prezidanto Hua preni klasbatalon kiel la ĉefĉeneron en mastrumado de la lando kaj por atingi la grandan celon de modernigo de agrikulturo, industrio, nacidefendo kaj scienco kaj tekniko!”

### **LA POPOLA ARMEO KORINKLINAS AL PREZIDANTO MAŬ**

Kiam la ĝojiga informo rapide atingis ĉiujn kazernojn, gvatejojn, aerodromojn, militŝipojn

kaj gvidajn instituciojn de la Ĉina Popola Libera Armeo, la komandantoj kaj soldatoj tuj okazigis celebrajn kunvenojn kaj kunsidojn. Firme respondante la alvokon de la Centra Komitato de la Partio, ili decidis levi novan altan tajdon de studo de verkoj de Marks, Engels, Lenin kaj Stalin kaj verkoj de Prezidanto Maŭ, armisian kapon per Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso, konstrui la popolan armeon en ŝtalan muregon por opono kontraŭ kaj prevento de reviziismo, altigi singardemon kaj esti pretaj por batali kontraŭ agresa milito.

Aŭdinte la ĝojigan novaĵon, la komandantoj kaj soldatoj de la glorie titolita “La Malmol-osta Sesa Kompanio” fervore verkis versaĵojn kaj prezentis artajn programerojn, por prikanti grandajn kontribuojn de Prezidanto Maŭ. La heroa kompanio fondiĝis en la militaj jaroj. En la pasintaj kelkdek jaroj, ĝi militadis sude kaj norde sekvante Prezidanton Maŭ kaj fariĝis ĉiamvenka. Post la Liberiĝo, la kompanio bojkotis ĝenojn kaj subfosadojn de Peng Dehuaj, Liu Ŝaŭki, Lin Biaŭ kaj la “kvarpersona bando” en konstruado de la armeo, kaj daŭre marŝas antaŭen laŭ la armeokonstrua linio de Prezidanto Maŭ. La politika direktanto de la kompanio diris: “Prezidanto Maŭ estas fondinto de nia popola armeo. Dank’ al lia saĝa gvido, nia armeo kreskis de malgranda al granda, de malforta al forta kaj hodiaŭ jam fariĝis potenca popola armeo. La granda teorio de Prezidanto Maŭ pri daŭrigo de la revolucio sub la diktaturo de la proletaro estas forta ideologia armilo de nia armeo en senĉesa venka antaŭenmarŝado. Ni nepre devas serioze studi kaj diligente praktiki ĝin kaj batali por pluapaŝe firmigi la diktaturon de la proletaro.

Batala heroo Jang Jucaj, vicdiviziestro de iu trupo, partoprenis en la Milito por Helpi Koreion kontraŭ la Usona Agreso. Finleginte la brilajn verkojn «Ordono al la Ĉinaj Popolaj Volontuloj» kaj «La Ĉinaj Popolaj Volontuloj Devas Protekti Ĉiun Monton, Ĉiun Akvon, Ĉiun Arbon kaj Ĉiun Herbon de Koreio», li kun profunda kompreno diris: “Tio estas internaciisma spi-

rito sekvata de nia armeo, glora tradicio de la popola armeo kaj ankaŭ la garantio de la venko de ĈPV en la milito. Ĉu en la pasintaj militaj jaroj aŭ en la hodiaŭa konstrua periodo, ni devas plenumi la instrukciojn de Prezidanto Maŭ kaj tutkore batali por la revolucia afero de la ĉina popolo kaj por la liberiga afero de la subpremata popolo de la tuta mondo.”

Kiam gardistoj, kiuj longe vivis ĉe Prezidanto Maŭ, legas liajn verkojn, ili kvazaŭ denove vidus la noktan lamplumon tra la fenestroj de la ĉambro de Prezidanto Maŭ kaj refoje aŭdus lian koran instruon. Ili neniam forgesos, ke en somero de 1955 Prezidanto Maŭ persone iris al la kamparo por enketi la movadon de la agrikultura kooperativigo por pli frue konduki centmilionojn da kamparanoj iri sur la brilan vojon de socialismo. Samtempe li sendis gardistojn ĉe li al la kamparo fari enketon. Ĉiufoje, kiam ili raportis al li pri sia enketado post la reveno al Pekino, li pacience aŭskultis kaj helpis ilin en analizado de problemoj. Dank’ al la helpo de

Prezidanto Maŭ ili komprenis multe da revolucia vero kaj ellernis laboran metodon de esploro kaj enketo. Hodiaŭ, kiam la gardistoj trovis, ke la brila verko de Prezidanto Maŭ «Problemo pri la Agrikultura Kooperativigo» estis kolektita en la 5-a volumo de la «Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong», ili des pli sopiras la grandan gvidanton kaj instruiston. Ili decidis alte teni por ĉiam la grandan ruĝan standardon de Maŭzedongpenso, kaj marŝi antaŭen laŭ la vojo de la daŭrigo de la revolucio strikte sekvante la Centran Komitaton de la Partio estratan de la saĝa gvidanto Prezidanto Hua.

Kiam la 5-a volumo de la «Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong» estis sendita al la revoluciaj sanktejoj Ŝaŭŝan, Ginggangŝan, Zunji kaj Janan, la tieaj armeanoj kaj popolanoj estis kortuŝitaj ĝis larmoj kaj dronis en senfina feliĉa rememorado pri Prezidanto Maŭ. Ili firme esprimis, ke ili pli diligente lernos la verkojn de Prezidanto Maŭ kaj kondukos la proletan revolucionan aferon komencitan de li ĝis la fino.

*Tajvan-aj samlandanoj en Pekino varme celebras la eldonon kaj distribuon de la kvina volumo de la «Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong».*





# Inspekto de Prezidanto Hua al Daking

**E**N tri sinsekvaj tagoj de la 17-a ĝis la 19-a de aprilo, 1977, Prezidanto Hua Guofeng inspektis la Daking-an Olekampon sur la vasta stepo de nordorienta Ĉinio.

Spite al neĝblovado, Prezidanto Hua pririgardis petrolputojn, ascendis drilegajn platformojn, vizitis laborejojn, staplejon kaj novajn vilaĝojn de laboristoj kaj kamparanoj, iris en loĝdomojn

kaj kuirejon de laboristoj kaj oficistoj, intime intervidiĝis kun vastaj amasoj de laboristoj, kadroj, sciencistoj kaj teknikistoj kaj iliaj familiaj, multe laŭdis ilin pro iliaj grandaj kontribuoj al la Partio, la ŝtato kaj la popolo, laŭdis ilin, ke ili kreis propran vojon de nia lando en disvolvo de industrio kaj kuraĝigis ilin pli alte teni la ruĝan flagon persone starigitan de Prezidanto



*Prezidanto Hua intime interparolas kun Vang Juefu, la plej juna filo de Ferulo Vang Ginhi.*



*Kamarado Hua Guofeng inspektas la Kemisterkan Fabrikon de Daking.*

Maŭ kaj zorge flegitan de Ĉefministro Ĝoŭ kaj ĉiam daŭre marŝi antaŭen laŭ la revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

La persona inspektado de Prezidanto Hua alportis senliman varmon kaj senfinan forton al la centoj da miloj da heroaj Daking-anoj.

## I

La 17-an de aprilo, kiam Prezidanto Hua venis al la modela putoadministra grupo — la 17-a Virina Putoadministra Grupo de la Sesa Plotono de la Unua Petrolokolekta Sekcio, la laboristoj vice starantaj en neĝblovo por bonvenigi Prezidanton Hua, varme ĝojkriadis:

“Saluton al Prezidanto Hua!” Saluton al la Centra Komitato de la Partio!”

“Ni daŭrigos la aferon postlasitan de Prezidanto Maŭ kaj obeos la komandon de Prezidanto Hua!”

Prezidanto Hua elaŭtiĝis kaj ridetante iris al la vicoj de laboristoj, senĉese manklakante, salute mansvingante kaj dirante ripetade: “Ni lernu de Daking!” “Ni lernu de vi, kamaradoj!”

Prezidanto Hua rimarkis eminentan modelon Huang Ŝilun, kiu faris kontribuon en la konstrua kampanjo de Daking en la sesdekaj jaroj, Caŭ Jafan, unu el la unuaj petrolokolektistinoj de Daking kaj aliajn malnovajn laboristojn starantajn fronte de la vicaro, li paŝis al ili, manpremis kun ili kaj ilin salutis.

Prezidanto Hua rigardis tie petrolputon, demonstron de petrolŝprucigo kaj petrolokolektan





Prezidanto Hua en la hejmo de Ĝou Dejing

arbon faritan de Daking. Vidante ke tie la putoadministra laboro iras en bona ordo, li diradis: "Bone! Bone!" Tiam la petrolokolektistinoj saltadis de ĝojo. Aparte forte emociiĝis juna putostrino Li Ĵunĝen, kiu havis la feliĉon dufoje vidi Prezidanton Maŭ, kaj tiutage ŝi feliĉe vidis la bonan daŭriganton de la laboro de Prezidanto Maŭ, la estimatan kaj amatan Prezidanton Hua. Post la foriro de Prezidanto Hua, la petrolokolektistinoj ĉirkaŭis Li Ĵunĝen kaj esprimis unu al alia, ke ili nepre estos pli rigoraj al si kaj fariĝos bonaj laboristinoj.

Kun granda intereso Prezidanto Hua venis al la Kemisterka Fabriko de Daking. Tiu granda fabriko finkonstruiĝis kaj komencis produkti antaŭdate en junio de 1976, sub persona prizorgo de Prezidanto Maŭ. Sed la "kvarpersona bando" fatala al la ŝtato kaj la popolo oponis kontraŭ la fondo de tiu fabriko kalumniante ke enkonduko de eksterlanda avangarda tekniko al tiu fabriko signifas "nacioperfidismon" kaj tiel direktis sian lanĉpinton rekte al Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio. Prezidanto Hua sukcese kontraŭbatalis la subfoson de la "kvarpersona bando" kaj protektis la konstruadon de

la Kemisterka Fabriko de Daking. Kiel granda stimulo estas la persona inspektado de Prezidanto Hua al la oficistoj kaj laboristoj de la tuta fabriko! Li ĝoje rigardis la produktan procedon kaj detale pridemandis la produktan stacion kaj poste li ascendis en neĝblovo la platformon de la grajniga turo de la amoniaka farejo. Vidinte ke fluida amoniako faladas de 60-metra alteco en la turo kaj fariĝas blankaj grajnoj post malvarmiĝo, li diris ĝoje: "Jen pluvas greno!"

Prezidanto Hua ĉiam zorgas pri la vivo de la popolo. Li venis en la fibrotiran laborejon de la kemifibra fabriko de la Ĝenerala Petrolkemia Fabriko de Daking, haltis antaŭ pakoj de akrila fibro kaj diris: "Ĝia ĉiujara produktokvanto de akrila fibro de 3,000 tunoj egalas al tiom multe da kotono. Tio ĉi estas bona, oni devas multe ĝin produkti." Kaj la oficistoj kaj laboristoj varme manklakadis pro ĝojo.

Prezidanto Hua venis en la tenejon de Maŝinpartoj de la Unua Brigado de la Proviza Komando por inspekti la administradon. Li rigardis demonstradon de Ki Lili kaj aliaj laborantoj en

ĝi. Ki Lili estas mongola knabino. Ŝi diligente sin ekzercis por lerte plenumi la profesion laboron por la revolucio, kaj nun jam povas memori ĉiujn pli ol 2,400 ciferojn koncernajn al pli ol 520 maŝinpartoj sub ŝia administrado. Sen rigardo en la kontolibroj, ŝi povas tuj diri al vi la nomon, prezon kaj stokan kvanton de iu ajn objekto, se vi nur diras al ŝi la n-ron kaj lokon de ĝi, kaj pro tio ŝi estas kromnomata Viva Kontolibro. Tiam ŝi prenis kontolibron kaj petis Prezidanton Hua fari ekzamenon. Kun rideto Prezidanto Hua ĵetis rigardon al paĝo de la kontolibro kaj diris al ŝi: “N-ro 57/4135”. Ki Lili tuj diris: “Tio estas ŝlosila peco de aervalvo kun prezo de 0.2 juano. Ĝia stoka kvanto estas 532 paroj.” Prezidanto Hua tre ĝojis pro ŝia rapida kaj senerara respondo.

Malgranda Ki ne nur estas Viva Kontolibro, sed ankaŭ povas liveri objektojn en mallumo. Prezidanto Hua diris al ŝi la n-ron kaj lokon de iu objekto, kaj ŝi palpe iris kun vinditaj okuloj al bretaro pli ol 20 metrojn malproksima kaj rapide deprenis la menciitan lagron. Prezidanto Hua ĝoje manpremis kun ŝi kaj ŝin laŭ-

dis: “Bone, ni lernos de vi!” Ki Lili tiel emociiĝis ke ŝi povis diri nenion.

Tiuvespere, Prezidanto Hua rigardis, kune kun gvidantoj de diversnivelaj partiaj komitatoj kaj modeloj de Daking, la dramon “La Leviĝanta Suno” ludatan de oficistoj kaj laboristoj de Daking kaj iliaj familianoj, kiu prikantas la familianojn de oficistoj kaj laboristoj de Daking persistentajn en partopreno de kolektiva produkta laboro laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ en la 7-a de majo, 1968.

## II

La 18-an, la suno brilis kun aparta ĉarmo post neĝado. Prezidanto Hua inspektis plue la Duan Kombinan Stacion de la Sesa Petrolokolekta Sekcio, la Kvinan Brigadon Hianfeng de la Hongvejhing-a Familiana Administrejo kaj la Ekspozicion pri la Eksploatado kaj Scienca Eksperimentado de Daking-olekampo.

La tasko de la Dua Kombina Stacio estas liveri puran nafton, puran akvon, puran gason kaj malpezan petrolon. Ĝi estas projektita kaj kon-



*Prezidanto Hua inspektas la modelan grupon — la 17-an Virinan Putoadministran Grupon de la Sesa Plotono de la Unua Petrolokolekta Sekcio de Daking.*



struita de laboristoj kaj teknikistoj de Daking kun la revolucia spirito "entreprenu, se estas necesaj kondiĉoj; kaj ankaŭ entreprenu kreinte necesajn kondiĉojn, se ne ekzistas la kondiĉoj". Prezidanto Hua tie pririgardis la epikajojn kaj produktadon kaj atente aŭskultis la murmuradon de la fluanta nafto en la oletuboj.

Ĉe la Kvina Brigado Hianfeng, reprezentantoj de la familianoj de 276 laboristaj-kampanaj novaj vilaĝoj de Daking jam atendadis la alvenon de Prezidanto Hua.

Kiam la viglanima Prezidanto Hua aperis antaŭ ili, la tuta vilaĝo ekbolis de ĝojo!

Prezidanto Hua aŭskultis raporton de reprezentanto de familianoj de Daking-aj laboristoj kaj oficistoj pri ilia konstruado de novtipa minejo en kombino de industrio kun agrikulturo kaj kombino de urbo kun kamparo, favora al produktado kaj oportuna al vivo, laŭ instruo de Prezidanto Maŭ kaj instrukcio de Ĉefministro Ĝoŭ, kun la revolucia spirito de pioniroj Hjue Gujfang k. a., kiuj komencis kulturebliĝi virgan teron per kvin fosiloj por subteni la olekampon en la komenca konstrua periodo. Li sin turnis al la ekzemplodoninto Hjue Gujfang: "Mi vidis vin en la filmo 'Batalo de Daking' kaj tre kortuŝiĝis. Tiam vi eklaboris kvinope kun du infanoj."

"La filmo estas bonega!" Prezidanto Hua daŭrigis. "La 'kvarpersona bando' malpermesis ĝin prezentadi. Post la frakaso de la 'kvarpersona bando' komenciĝis ĝia prezentado kaj ĉiuj ĝojas pro tio!"

Li laŭdis la 63-jaran Hjue Gujfang dirante: "Vi donis bonan ekzemplon. Se la popolanoj de la tuta lando ĉiuj havos vian spiriton, certe kreiĝos pli multe da mirakloj."

Hjue Gujfang diris emocie: "En ĉio ni obeos la komandon de Prezidanto Hua!"

Prezidanto Hua vizitis la infanĝardenon de la Kvina Brigado Hianfeng, rigardis artan prezentadon de la infanoj, rigardis pafadon de familianoj-milicianoj kaj speciale vizitis la terdomon de Ĝoŭ Dejing kaj interbabilis kun Ĝoŭ Dejing kaj ŝia edzo. Informiĝinte ke la geedzoj ambaŭ estas modeloj, li diris: "Ni lernu de vi!"

La modela paro diris emocie, ke ili nepre obeos la vortojn de Prezidanto Hua kaj revoluciados dum sia tuta vivo.

Jam vesperiĝis, tamen Prezidanto Hua plue veturis al la Ekspozicio pri la Eksploatado kaj Scienca Eksperimentado de Daking-olekampo por ĝin inspekti. Post pririgardo de la ekspozicio, Prezidanto Hua kore interparolis kun sciencaj laborantoj, kiuj faris klarigadon pri la ekspozicio, kaj kuraĝigis ilin pli bone fari sciencajn esploradojn kaj eltrovi kaj konstrui ankoraŭ pli multajn petrolkampon.

Li diris: "Por efektiviĝi modernigon de niaj industrio, agrikulturo, sciencoj kaj teknikoj kaj nacidefendo, kaj atingi avangardan nivelon de la mondo, ni devas forte kritiki la 'kvarpersonan bandon', elimini ĝian venenan influon kaj persisti en konduko de la tri grandaj revoluciaj movadoj de klasbatalo, produkta batalo kaj scienca eksperimentado. Ni devas diligente faradi sciencajn eksperimentojn kaj elkulturi pli multajn sciencajn kaj teknikajn laborantojn."

Min Ju, vicestro de la Revolucia Komitato de Daking kaj ĝenerala geologia direktanto, kiu partoprenis en la komenca konstruado de la petrolkampo, diris: "Ni nepre faros laŭ la instrukcio de Prezidanto Hua."

Kang Ŝi-en, ministro de la Petrola kaj Kemiindustria Ministerio kaj vickomandanto dum la komenca konstrua kampanjo de la olekampo diris al Prezidanto Hua: "Ni nepre klopodos por atingi kaj superi la avangardan nivelon de la mondo."

"Bone!" diris Prezidanto Hua. "Ni ja devas atingi kaj superi la avangardan nivelon de la mondo. Ni devas sukcese fari ne nur kion fremdlandoj povas, sed ankaŭ kion ili ankoraŭ ne povas, kaj ni devas fari pli bone ol ili."

Prezidanto Hua daŭrigis: "Prezidanto Maŭ alte laŭdis Daking. Lernu de Daking en industrio, lernu de Daĝaj en agrikulturo. Kaj tiel la ruĝaj standardoj estas starigitaj. Daking iris ĉinan propran vojon por disvolvi industrion memdecide kaj sendepende sin apogante sur propraj fortoj, kaj faris tre grandan kontribuon. Daking ludis tre gravan, tre bonan rolon, preti-

ĝis vojon kaj forjetis la etiketon de postĝinteco de nia petrola industrio. Ĝi meritas laŭdojn. Ĝi estas lerninda ekzemplo por la tuta lando. Oni devas vere sed ne ŝajnige lerni de Daking kaj ne senfare kriadi.”

### III

Tre vasta estas Daking-olekampo kaj dise lokiĝas la laborejoj kaj loĝejoj de la Daking-anoj. Kiel ili forte sopiris vidi Prezidanton Hua en la ĝojplenaj tagoj de lia inspektado!

Prezidanto Hua plej bone komprenis la deziron de la laboristoj de Daking. En la 19-a de aprilo, li veturis en ventego al la konstruejo de la nova olekampa regiono je 50 kilometroj malproksima por vidi la avangardajn batalantojn de la ĉina laboristaro — la membrojn de la fera 1205-a Putobora Taĉmento kaj la laboristojn de la fera 1202-a Putobora Taĉmento kaj aliaj unuoj.

La nomitaj du taĉmentoj jam kreis rekordojn de putoborado frue en la sesdekaj jaroj, multe superinte la “meritoplenan” putoboran taĉmenton de la sovetunia reviziismo kaj la “atutan” putoboran taĉmenton de Usono. Enirinte la sepdekajn jarojn, ambaŭ ili grimpis sur novajn altecojn en putoborado. Ili senĉese faris grandajn kontribuojn por multe, rapide, bone kaj ekonomie disvolvi la petrolan industrion de Ĉinio kaj fariĝis nefaligeblaj kaj nedetruiblaj revoluciigitaj trupoj de la tipo de Ferulo, fame konataj tra la tuta lando. La antaŭa estro de la 1205-a Taĉmento Ferulo Vang Ginhi estis akceptita de Prezidanto Maŭ. Tiutage, la laboristoj de tiuj du taĉmentoj viglanime staris envice sub la ŝaktoskafaldo kaj ricevis revuadon de Prezidanto Hua.

Prezidanto Hua kore manpremis kun la putoboristoj unu post alia kaj esprimis gratulon kaj saluton al ili. Kiam vicmanipulanto de drilego Vang Juefu, la plej juna filo de la Ferulo, estis

*Post rigardo de la moderna dramo “Leviĝanta Suno” prezentata de laboristoj kaj oficistoj kaj iliaj familianoj de Daking, Prezidanto Hua fotiĝis kun la amatoraj geaktoroj.*





prezentita al Prezidanto Hua, la lasta ameme demandis lin: “Kiom aĝa vi estas?”

“21-jara,” respondis Vang Juefu. “De longe ni jam atendis vian alvenon, Prezidanto Hua!”

Antaŭ du jaroj, Vang Juefu venis al la 1205-a Putobora Taĉmento, ekprenis la bremsostangon antaŭe tenatan de lia patro kun firma decido fariĝi bona putoboristo de Prezidanto Maŭ, laŭ la ekzemplo de lia patro. Vidinte Prezidanton Hua en tiu tago, li tre emociiĝis.

La politika direktanto de la 1205-a Putobora Taĉmento Tian Hongming, kiu triafoje vidis Prezidanton Hua, esprimis firman decidon al Prezidanto Hua kaj la Centra Komitato de la Partio, prezentante pecon da roko kaj decidespriman noton al la gvidanto en la nomo de la 82 membroj de la tuta taĉmento. Prezidanto Hua iris antaŭ la vicaron de la taĉmento kun flirtanta flago kaj ĝoje diris: “Ni lernu de la 1205-a Putobora Taĉmento!”

Prezidanto Hua ascendis la platformon de la drilego kaj rigardis rapidan manipuladon de la laboristoj. La lastaj uzis nur unu minuton por aldoni pecon da borstango. Prezidanto Hua multe laŭdis ilian lertecon.

Fininte sian inspektadon al la putoboraj taĉmentoj, Prezidanto Hua vizitis la laboristojn sur la konstruejo de la 13-a Kombina Stacio kaj aliaj unuoj, kaj poste li vizitis la Virinan Petrolokolektan Taĉmenton de la Kvara Petrolokolekta Sekcio. Guan Hiaŭhong, la politika direktanto de la taĉmento, raportis al li pri la malkaŝado kaj kritikado de la “kvarpersona bando” kaj indigne kondamnis ĝiajn krimojn.

Prezidanto Hua instrukiis, ke la gravita punkto ankoraŭ estas malkaŝi kaj kritiki la “kvarpersonan bandon”, kiu freneze subfosis Daking kaj Daĝaj, la du ruĝajn flagojn starigitajn de Prezidanto Maŭ. Daking estas modelo de la ĉina industriigo en irado sur la propra vojo. Se ĉiu agus kiel la Daking-anoj, certe Ĉinio multe ŝanĝos sian fizionomion.

Guan Hiaŭhong esprimis al Prezidanto Hua: “Ni nepre serĉos pli multan petrolon sub la nuna Daking, iros aliloken por serĉi olekampon kaj produktos pli multe da petrolo por la ŝtato.”

Prezidanto Hua diris aprobe: “Jes, ĝuste tiel oni devas fari.”

Li pririgardis ankaŭ iliajn manĝejon, kuirejon kaj loĝejon kaj montris koran zorgon pri la vivo de la laboristinoj.

Forlasinte la Virinan Petrolokolektan Taĉmenton Prezidanto Hua rigardis demonstran manipuladon de maŝinoj por konstruado de petrolkampo. Jam estis post la sesa ptm. Li ankoraŭ estis energi plena kaj deziris viziti la flikejon, dirante ke ĝi prezentas la spiriton de Daking

Kiam Prezidanto Hua venis en la flikejon, ĝia vicdirektanto Lju Fengĝen diris al li: “Ĉiutage ni sopiradis vian alvenon, Prezidanto Hua.”

Prezidanto Hua diris: “Mi venas por lerni de vi, mi tre deziris veni.”

Aŭdinte la modestajn kaj afablajn vortojn de Prezidanto Hua, Liu Fengĝen tiel kortuŝiĝis, ke ŝi ne sciis kion diri. Ŝi raportis al Prezidanto Hua, ke post sia fondo en la komenca periodo de la konstruado de la olekampo, la fabriko, laŭ la principo de ŝparemo, malkudris, flikis kaj renovigis malnovajn vestojn turnante eluzitaĵojn en utilaĵojn, faris 3,920,000 diversajn laborprotektajn vestojn kaj ŝparis por la ŝtato grandan kvanton da kotono kaj ŝtofo.

Prezidanto Hua tre atente rigardis kaj pride mandis ĉiun procedon de ĉiu laborgrupo. Li diris: “La tutlanda popolo vidis vian flikejon en la filmo kaj ricevis fortan inspiron. Via laboro estas tre grava kaj servas al la bono de la popolo. Prezidanto Maŭ instruis al ni, ke ni funkciigu entreprenojn diligente kaj ŝpareme. Vi faris bone kaj la tutlanda popolo devas lerni de vi.”

Lju Fengĝen esprimis al Prezidanto Hua: “Ni nepre ne vanigos vian esperon kaj nepre heredigis la spiriton de la flikejo de generacio al generacio.”

Kiam Prezidanto Hua finis sian inspektadon, steloj jam brilis sur la ĉielo kaj ĉie lumis lampoj. En tiu nokto miloj kaj dekmiloj da heroaj Daking-anoj gaje interparolis pri la feliĉa intervidiĝo kun Prezidanto Hua.



*La Tutlanda Konferenco de Lerno de Daking en Industrio solene malfermiĝas en la Daking-a Olekampo.*

# Grandioza Konferenco de Industrio

**D**E la 20-a de aprilo ĝis la 13-a de majo de 1977 solene okazis la Tutlanda Konferenco de Lerno de Daking en Industrio longe dezirata de la laboristaro kaj aliaj popolanoj de nia lando. Ĝi inaŭguriĝis en la Daking-a Olekampo kaj venke fermiĝis en la ĉefurbo Pekino.

Prezidanto Hua Guofeng prezidis la inaŭguron. En la konferenco partoprenis 7,000 personoj inkluzive de la reprezentantoj de la Daking-a Olekampo, Daking-tipaj entreprenoj, avangardaj entreprenoj kaj kolektivoj en la movado de lerno de Daking, la reprezentantoj de la avangardaj produktantoj kaj laborantoj kaj la gravaj entreprenoj koncernantaj la tutan nacian ekonomion, respondeculoj de la provincoj, municipoj, aŭtonomaj regionoj, subprovincoj, urboj kaj parto de la gubernioj, respondeculoj de la koncernaj departementoj de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, la Ŝtata Konsilantaro kaj la Ĉina Popola Liberiga Armeo, kaj ankaŭ la reprezentantoj de la ruĝa flago de agrikultura

fronto Daĝaj kaj la “Malmol-osta Sesa Kompanio” de ĈPLA. La konferenco estas kunveno de herooj de la industria fronto kaj mobiliza kunveno por rapidigi la modernigon de niaj industrio, agrikulturo, naciddefendo, scienco kaj tekniko.

Ĝi estas la unua landskala kunveno de nia lando por disvastigi la sperton de Daking post kiam Prezidanto Maŭ Zedong elmetis la alvokon “**Lernu de Daking en industrio**” en 1964. En la pasinteco la Centra Komitato de KPC plurfoje sin preparis por okazigi tian kunvenon, sed ne sukcesis en tio pro subfosado de Liu Ŝaŭki, Lin Biaŭ, kaj precipe la “kvarpersona bando”. En la Granda Proleta Kultura Revolucio, la du burĝaj komandejoj de Liu Ŝaŭki kaj Lin Biaŭ estis frakasitaj, la “kvarpersona bando” de Vang Hongven, Ĝang Ĉunkiaŭ, Ĝiang King kaj Jaŭ Venjuan faligita kaj la obstakloj en lerno de Daking en industrio forigitaj, kio ebligis la okazigon de la konferenco. La taskoj de la konferenco estas mobilizi la tutan partion kaj la tutan labo-





*Prezidanto Hua Guofeng persone prezidas la konferencon.*



ristan klason de nia lando por pli alte teni la grandan standardon de Prezidanto Maŭ, levi novan altan tajdon de lerno de Maŭzedongpenso, pli profunde malkovri kaj kritiki la “kvarpersonan bandon”, antaŭenpuŝi la amasan movadon de lerno de Daking en industrio al nova stadio, ĝeneraligi Daking-tipajn entreprenojn kaj klopodi por kiel eble plej rapide konstrui nian landon en socialisman modernan potencon.

Antaŭ la komenco de la konferenco, Prezidanto Hua faris surskribon al Daking: “Ni nepre devas alte teni la ruĝan flagon de Daking starigitan de Prezidanto Maŭ”.


En la kunveno, Prezidanto Hua kaj Vicprezidanto Je Gianjing faris gravajn paroladojn. Vicĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro Ju Kiuli faris en la nomo de CK de KPC al la konferenco raporton “La tuta partio kaj la tuta laborista klaso mobiliziĝu kaj batalu por ĝeneraligi Daking-tipajn entreprenojn”. Tiuj paroladoj kaj raporto traktis la sperton de Daking, profunde eksplikis la grandan signifon de lerno de Daking en industrio kaj pluapasa montris ĝian antaŭenmarŝan direkton.

Daking estas modelo de lerno de Maŭzedongpenso, plenampleksa plenumo de la “Ĉarto de la

Anŝan-a Fera kaj Ŝtala Kompanio”, administrado de industrio per la granda teorio de daŭrigo de la revolucio sub la diktaturo de la proletaro kaj irado de la propra vojo de Ĉinio en disvolvo de industrio.

La konferenco celas turni paŝon post paŝo ĉiujn entreprenojn de la tuta lando en Daking-tipajn entreprenojn. Same kiel Daking ĉiuj entreprenoj devas diligente lerni Marksismon-Leninismon-Maŭzedongpenson, persiste kritiki reviziismon, kapitalismon kaj diversajn erarajn pensojn kaj formi, en klasbatalo, produkta batalo kaj scienca eksperimento unuigita kaj batalan gvidantaron kiu povas rezolute plenumi la revolucian linion de Prezidanto Maŭ, persisti en partopreno en kolektiva produkta laboro kaj intime ligiĝi kun la amasoj, kaj elkulturi industrian armeon kun revolucia penso, granda laborfervoro, teknika lerteco, bona stilo kaj severa disciplino por fari sin fortikajoj en batalo kontraŭ kaj prevento de reviziismo, kaj pluapasa fortigi la diktaturon de la proletaro de nia lando.

Same kiel Daking, ĉiuj entreprenoj devas sinapogi sur la propraj fortoj, peneme lukti en malfaciloj, energie klopodi por surgrimpigi scian teknikan kreston de la mondo, kombini altan revolucian spiriton kun severa scienca sinteno,



*La Tutlanda Konferenco de Lerno de Daking en Industrio okazas en la Popola Halo de Pekino.*

starigi kaj kompletigi regularon, kiu povas en-korpigi la novtipan socialisman produktan rilaton kaj speguli la objektivan leĝon en produktado por ke la industria produktado de nia lando povu disvolviĝi multe, rapide, bone kaj ekonomie.

Same kiel Daking, ĉiuj entreprenoj devas meti sian ĉefan forton sur industriajn produktadon kaj samtempe, en lokoj, kie ekzistas necesaj kondiĉoj, organizi familianojn de la laboristoj kaj oficistoj por fari agrikulturan kaj flankokupan produktadon por plibonigi ilian vivon. Tio favoras al paŝo-post-paŝa malgrandigo de la diferenco inter la laboristoj kaj la kamparanoj, inter la urboj kaj la kamparo, kaj inter menslaboro kaj fiziklaboro.

Antaŭ la konferenco, la kunvenantoj vizitis petrolo-kolektajn staciojn, putoborajn taĉmentojn, konstruejojn de la olekampo, laboristajn-kamparanajn vilaĝojn kaj aliajn unuojn de Daking.

En la konferenco la reprezentanto de Daking raportis al la ĉeestantoj la pinto-kontraŭ-pintan batalon de la Daking-a laboristaro kontraŭ la "kvarpersona bando" kaj la bonegan situacion de la olekampo, detale prezentis la sukcesojn kaj fundamentajn spertojn de Daking akiritajn en la pasintaj 17 jaroj sub direktado de la revolucia

linio de Prezidanto Maŭ. Ankaŭ iuj reprezentantoj de Daking-tipaj entreprenoj prezentis al la kunveno siajn sukcesojn en la lerno de Daking kaj interŝanĝis sperton. La reprezentantoj serioze studis kaj diskutis la paroladojn de Prezidanto Hua, Vicprezidanto Je kaj aliaj gvidantoj de CK de KPCĈ, en kio ili estis multe inspiritaj kaj profunde komprenis, ke la industria fronto devas preni Daking kiel sian ekzemplon kaj iri la vojon de Daking.

De la komenco ĝis la fino la konferenco iris en vigla kaj varma atmosfero. La reprezentantoj kuraĝigis reciproke. La reprezentantoj de Daking ĵuris ke ili nepre klopodos por akiri novan venkon kaj krei novan nivelon prenante la konferencon kiel novan startpunkton. La reprezentantoj venintaj el la diversaj frontoj de industrio de la tuta lando firme esprimis, ke ili nepre klopodos por vere ellerni la revolucian spiriton kaj la kompletan sperton de Daking kaj starigi la ruĝan flagon de Daking en ĉiuj fabrikoj, minejoj kaj entreprenoj de la tuta lando.

La konferenco certe fariĝos grava mejloŝtono en la historio de nia industrio. Jam ekaperis en nia lando nova plenamplaksa impeto de nacia ekonomio.



# Modelo de la Ĉina Industrio

*De kiam Prezidanto Maŭ Zedong faris la alvokon "lernu de Daking en industrio" en la jaro 1964, la amasa movado de lerno de Daking disvolviĝis en ĉiuj fabrikoj kaj minejoj tra la tuta Ĉinio, precipe post kiam la krima intrigo de la "kvarpersona bando" de Vang-Gang-Giang-Jaŭ pri uzurpo de la gvidanteco de la Partio kaj la ŝtato estis frakasita en oktobro de 1976, Prezidanto Hua Guofeng lastatempe inspektis Daking sub lia persona prezidado okazis en Daking la Tutlanda Konferenco de Lerno de Daking en Industrio. Nun tiu amasa movado kaj ĝeneraligo de Daking-tipaj entreprenoj pli vigle disvolviĝas tra la tuta industria fronto de nia lando en pli granda skalo.*

*Kial oni devas lerni de Daking? Kiajn sukcesojn Daking atingis en ekspluatado kaj konstruado de la olekampo? Kaj kio estas ĝiaj karakterizoj? Ni volas iom raporti pri tio al vi ekde ĉi-numero.*

La Red.

La 26-an de septembro, 1959, kiam nafto elŝprucis el prospektora puto sur la vasta dezerta stepo de nia norda provinco Hejlonggiang, la prospektoroj jubilis pro la malfermo de la subtera trezorejo de la socialisma patrolando. Tio okazis ĝuste antaŭvespere de la deka datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, tial ili nomis la olekampon "Daking", kiu signifas ĉinlingve grandan celebren.

Hodiaŭ, Daking jam fariĝis unu el la fame konataj olekampoj de la mondo.

## DEK GRANDAJ KONTRIBUAĴOJ

Daking estas modelo en irado de la propra industriiga vojo de nia lando. Koncize dirite, ĝi faris jenajn dek kontribuajojn:

Ĝi rompis la vaste diskonigitan opinion ke "Ĉinio estas malabunda je petrolo", kreis propran

teorion pri petrola geologio de nia lando kaj malfermis vojon por trovi pli multe da olekampoj en nia lando;

La produktokvanto de nafto daŭre kreskis je 28% meznombro en ĉiu jaro kaj la ĉijara produktokvanto egalas al sesoblo de tiu de 1965 antaŭ la granda kultura revolucio;

Kun la disvolviĝo de Daking kaj ekspluatado de aliaj novaj olekampoj, nia lando komencis eksporti nafton en la jaro 1973 kaj nun ni liveras nafton kaj ĝiajn produktaĵojn al pli ol 40 landoj kaj regionoj;

Ĝi kreis serion da novaj teknologioj kaj teknikoj, kio ebligis al ĝi tenadon de alta kaj stabila produktado dum la pasintaj 17 jaroj;

En Daking konstruiĝis grandtipa fabriko de petrolkemia industrio, kiu povas ne nur rafini petrolon sed ankaŭ produkti kemisterkon,



*Prezidanto Maŭ kore manpremas kun Kamarado Vang Ginhi.*

kemifibrojn k.a., kaj en la lasta jaro konstruiĝis ankaŭ grandtipa kemisterka fabriko;

En la scienca eksperimentado kaj teknikaj renovigoj multaj fruktoj estas akiritaj, el kiuj pli ol 50 jam atingis aŭ superis la avangardan nivelon de la mondo;

En la pasintaj 17 jaroj la profito liverita de Daking al la ŝtato egalas 14.3-oblon de la tuta investa sumo de la ŝtato al ĝi;

Sur la dezerta stepo unuapaŝe konstruiĝis socialisma novtipa olekampo kun industrio kaj agrikulturo en kombino kaj kun urbo kaj kamparo en kombino;

En la lastaj jaroj oni faris geologian prospektoradon ĉirkaŭ Daking-olekampo kaj profunde en ĝi kaj kolektis grandan nombron da materialo por ĝin ekspluati pluapaŝe;

Ĝi sendis 56,000 homojn kaj grandan nombron da ekipaĵoj al novaj olekampoj de nia lando, kio akcelis la disvolviĝon de la petrola industrio de la tuta lando.

Tamen, la signifo de Daking fore transpasis la limon de petrola industrio. Agante laŭ la linio de Prezidanto Maŭ pri entrepreno de socialisma industrio kaj plenumante la "Ĉarton de la Anŝana Fera kaj Stala Kompanio" (vidu pĝ. 31.), ĝi kreis nian propran industrian vojon kontraŭan al tiu de kapitalismo kaj reviziismo por disvolvo de industrio.

#### **EKKONSTRUADO KUN KONCENTRITAJ FORTOJ**

En februaro de 1960, Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio sankciis la decidon





*Prezidanto Gu De kaj Vicprezidanto Dong Bivu inspektas la Daking-an Petrolrafinejon.*

pri konstrua kampanjo en Daking por rapide ekspluati la olekampon.

En tre mallonga tempo dekmiloj da laboristoj, malmobilizitaj soldatoj kaj teknikistoj venis de diversaj lokoj de la tuta lando al Daking. La komandejo de la kampanjo instaligis en iu forlasita bovstalo. Sur la senlima stepo, furiozis neĝblovo kaj la temperaturo estis je 20-30 gradoj centezimalaj sub la nulo. Grupoj kaj grupoj da homoj kun pakajo kaj instrumentoj surŝultre marŝis al difinitaj postenoj kaj tuj eklaboris. Nokte ili kuŝis en tendoj aŭ en ĵus fositaj ter-

kavoj, kaj bivakfajroj pliigis la etoson de batalejo al la sceno.

En la jaro 1960, ĝuste kiam nia lando suferis provizoran malfacilon en ekonomio kaŭzitan de serioza natura katastrofo, la Hruŝčov-kliko superŝutis nin per diversaj premfortoj intencante devigi la ĉinan popolon submetiĝi al ĝia reviziisma komandbastono. Ili revokis siajn specialistojn, disŝiris kontraktojn kaj urĝis nin pagi ŝuldon, eĉ ĉesis provizi petrolon al ni. Pro manko de benzino, eĉ en Pekino la aŭtobusoj devis porti gigantan gasosakon sur sia kovrilo. Nia lando kaj la revoluciaj interesoj de la internacia proletaro postulis, ke ni konstruu la olekampon kiel eble plej rapide.

Daking-anoj persiste tenis la proletan politikon en komando kaj decidis preni sur sin tiun taskon. La elstara reprezentanto de ili estis putoboristo kaj kompartiano Vang Ginhi (1923-1970). Kun la 1205-a putobora taĉmento sub sia gvido li venis de Jumen al Daking, kaj tuj ĵetis sin en laboron. Ĉar

tiam mankis al ili grupoj kaj traktoroj, ili do ŝultre kaj mantire portis drilmaŝinon pezan je 60 tunoj de la fervoja stacio al la putoborejo kaj starigis ŝaktoskafaldon altan je 40 metroj. Granda kvanto da akvo estis bezonata por putoborado, sed akvotuba linio ankoraŭ ne instaligis. Ili rompis glacieron en proksima lageto por preni akvon el ĝi kaj transportis pli ol 100 tunojn da akvo per lavpelvoĵoj. La 14-an de aprilo, kiam leviĝis la suno, Vang Ginhi ordonis emocie: "Ekboru." Post kvin diurnoj nigra nafto elŝprucis el la unua produkta oleputo de Daking

kaj ĝojkrioj “Vivu Prezidanto Maŭ” sonadis tra la stepo.

Laciĝo, vundo kaj aliaj neimageblaj malfaciloj neniom malfortigis la batalvolon de Vang Ginhi. Liaj kolegoj laŭdis lin ke li estas “Ferulo”. Kaj tiu glora nomo “Ferulo Vang” diskoniĝis. Ĝis sia morto pro malsano en 1970 Ferulo Vang ĉiam batalis kontraŭ la naturo, la malamikoj, la reviziisma linio kaj eraraj pensoj, starante en la fronto kaj gvidante dekmilojn da konstruantoj.

En la Unua de Majo, 1960, la partia komitato de la olekampo okazigis juran mitingon ĉeestitan de dekmiloj da homoj kaj alvokis en ĝi ke ĉiuj lernu de la Ferulo. Ferulo Vang kaj aliaj eminentaj laboristoj kun ruĝa floro sur la brusto

*Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj aŭskultas raportadon pri la subtera stratumo de la olekampo.*



venis al la mitingo rajdante sur ĉevaloj, kiujn kondukis gvidantoj de la olekampo. La laboristoj, kadroj kaj intelektuloj ĉiuj sentis sin fieraj pro tio, ke ili povas oferi sian forton al la glora afero. Por lerni de la Ferulo dekmiloj da konstruantoj konkursis unu kun alia en laboro. Netakseblaj estas la fortoj kaj saĝo elvolvitaj en la amasa movado.

La partia komitato de la olekampo estas firma komandejo. Ĝi faris ne nur bonan aranĝon de laboroj, sed ankaŭ oftan politikajn mobilizadojn kaj edukon al la konstruantoj laŭ la tradicio de la Popola Liberiga Armeo. La lasta estas pli grava ol la antaŭa kaj estas farita de organizoj de la Partio kaj la Komunisma Junulara Ligo en diversaj kunvenoj kaj aliaj formoj. Kie estas forta politika laboro, tie povas esti alta batalvolo. Dank’ al alta batalvolo venkoj estis gajnitaj unu post alia en la kampanjo.

La kampanjo postulis alte centralizitan gvidon, kaj tia gvido devis esti bazita sur vasta demokratio. Ĉe bivakfajroj aŭ en kandellumo en la tendoj la konstruantoj varme diskutis kiel ili konstruu la olekampon kaj kiel ili plenu sian taskon kaj elmetis proponojn kaj kritikojn al la gvidantoj.

Sendube ankaŭ la vivo estis malfacila, sed ĉie regis varmo de kamaradeco. Ili faris reciprokan kritikon kaj memkritikon, laŭdis la avangardulojn kaj pacience helpis la postgintojn. Kiam estis nesufiĉa manĝoprovizio, iu tamen trovis en sia manĝoskatolo manĝaĵon ŝparitan kaj kaŝe donitan de kolego, kaj sammaniere enmetis ĝin en alies manĝoskatolon. En profunda nokto la gvidantoj





*Vang Ginh kaj aliaj kvar modeloj laŭdataj de la partia komitato de Daking*

ofte iris de tendo al tendo malgraŭ frosta vento por rigardi ĉu la laboristoj bone kovris sin. Ensembloj venis kaj prezentadis por laboristoj ĉe ŝaktoskafaldoj en neĝoblovo.

Rapide iris la konstruado. En la unua de junio, 1960, unuafoje el Daking elportiĝis nafto. En 1963, finkonstruiĝis la granda olekampo kaj tra la tuta lando cirkulis la kortuŝa novaĵo: La epoko, en kiu nia lando apogis sin sur eksterlanda oleo, jam forpasis por ĉiam. Post tio Daking daŭre rapide antaŭenmarŝas.


### **BRILA LUMTURO**

Sur la vojo trairita de Daking troviĝis ne nur batalo kontraŭ la naturo sed ankaŭ serioza batalo en politiko. Kial la Daking-anoj povas iri de venko al venko? Ili respondis ke ili apogis sin sur la du filozofiaj verkoj de Prezidanto Maŭ «Pri Praktiko» kaj «Pri Kontraŭdiro». En aprilo de 1960, la unua rezolucio farita de la partia komitato de Daking estis tio, ke la tuta personaro lernu tiujn du kaj aliajn verkojn de Prezidanto Maŭ kaj apliku Maŭzedongpenson en analizo kaj solvado de problemoj. La Daking-anoj lertas en

analizado kaj traktado de diversaj problemoj aplikante la starpunkton, vidpunkton kaj metodon de Marksismo, dank' al la studo de la du verkoj.

Ekzemple, post ripeta studado de la verko «Pri Praktiko», la Daking-anoj starigis en si jenan klaran vidpunkton: **“Nur la socia praktiko de homoj estas kriterio de la vereco de ilia konado pri la ekstera mondo.”** Tial ili ne kredis la konkludojn neplene kontrolitajn en la praktiko (la teorio ke Ĉinio estas malabunda je petrolo estas unu el ili), kaj tre atentis pri akiro kaj studo de senpera materialo. Ekzemple por bone koni subterajn olestratumojn ili akumulis grandan kvanton da materialo kaj donitaĵoj ekde la komenco. Tiamaniere formiĝis la tradicio de alta revolucia entuziasmo kun severa scienca sinteno en kombino, kio ludis gravan rolon en la disvolviĝo de Daking.

Ripetade studinte la verkon «Pri Kontraŭdiro», la Daking-anoj starigis en si klaran vidpunkton: El la komplikaj kontraŭdiroj de la socio la ĉefa kontraŭdiro ludanta decidan rolon estas la klasa kontraŭdiro. La historio de la homaro ja estas





# Bonega Situacio de Nia Industrio

Laboristino de la Hanggou-a Silkaĵo-prestinktura Fabriko sekigas silkajon.




La amasa movado de "Lerno de Daking en Industrio" vaste kaj profunde disvolviĝas tra nia lando. La vastaj amasoj de laboristoj kaj oficistoj penetrive malkovras kaj kritikas la krimegojn de la "kvarpersona bando" en subfosado de nia nacia ekonomio kaj multe altigis sian aktivecon en konstruado de socialismo. Sur la tuta fronto de nia industrio levigis arda socialisma labora konkurso. En la frontoj de petrolo, fervoja trafiko, fero, ŝtalo kaj karbo aperis bonega situacio, la produktado senĉese pliboniĝas. Ankaŭ la produktado de elektro, kemisterko, cemento, traktoroj kaj kotonfadenoj pli kaj pli boniĝas. La nacia ekonomio de nia lando estas paŝanta al nova impeto.





Laboristoj de la Longjoŭ-a Pape fabriko de Ĝeĝiang-provinco en vig laborado



Novaj ilmaŝinoj produktitaj de la Vuhan-a Pezilmaŝina Fabriko






Liu Mantun (maldekstre), vicedirektoro de la Revolucia Komitato de la Ĉefurba Fera-ŝtala Kompanio de Pekino, laboras kun laboristo.



Kemisterko produktita de la Langöu-a Kemisterka Fabriko





Laboristoj de la Dahingou-a Forsta Buroo de Nordorienta Ĉinio envagonigas lignon.

La fervoja trafiko funkcias sekure kaj akurate. La foto montras Manovrejon de la Norda Stacio de Ĝengou de Henan-provinco.





Laboristinoj de la  
33-a Kotonŝpinojo  
de Ŝanhajo interŝan-  
ĝas produktajn ŝer-  
tojn.









Kadro kaj laboristoj de Daking diligente studas la 5-an volumon de la «Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong».

La Oktobra Traktora Fabriko de Hingiang klopodas por produkti pli multe da traktoroj.



historio de klasa batalo. Tial ili ĉiam prenas klasbatalon kiel la ĉefĉeneron.


Konsiderate en la internacia amplekso, ĝuste kiel la Ferulo diris, se la bezono de la ŝtato je petrolo ne estus kontentigita, imperiismo kaj moderna reviziismo certe nin blokadus utiligante nian mankon. Prenante en siaj manoj la internacian klasbatalon kiel la ĉefĉeneron la Daking-anoj antaŭenpuŝis sian laboron.

Tiam, ankaŭ la enlandaj klasbatalo kaj batalo inter la du linioj estis akraj. En la komenca periodo de la konstruado, profitante la provizoran malfacilon de nia lando en ekonomio Liu Ŝaŭki kaj liaj kunuloj kriaĉis, ke ĉesu granda nombro da fundamentaj konstruaj objektoj. Rondirinte en Daking ili riproĉis, ke Daking estas en haoso sed ne en ordo de industria konstruado. Ankaŭ iuj el la Daking-anoj timis malfacilon

kaj volis retiriĝi. Marŝi antaŭen kaj retiriĝi estis la tiama ĉefa kontraŭdiro. Evidente, se la Daking-anoj ne prenis en la manoj la klasbatalon kaj ne gajnis la venkon en la batalo, certe ne povus esti la hodiaŭa Daking.

Poste ankaŭ la kliko de Lin Biaŭ kaj la “kvarpersona bando” intencis nuligi Daking. Svingante revolucionan flagon en mano ili atakis Daking, ke la rapida disvolvo de ĝia produktado estas praktiko de “teorio de produktaj fortoj” kaj intencis instigi la amasojn al ĉesigo de la produktado. Sed la Daking-anoj persistis en la principo elmetita de Prezidanto Maŭ **“teni la revolucion kaj stimuli la produktadon”** kaj en la tradicio de ĉiujara elekto de avangarduloj en politiko kaj laboro. Vizaĝe al la serioza ĝenado de la “kvarpersona bando” la Daking-anoj elmetis la famekonatan sloganon: “Energia laborado por socialismo estas prava, meritoplena kaj glora kaj post

*Parto de la Kemisterka Fabriko de Daking*





energia laborado oni ankoraŭ devas energie labori!" Tio havigis novan gloron al Daking, la ruĝa flago starigita de Prezidanto Maŭ.

### SENDEPENDECO

La elstara karakterizaĵo de nia propra vojo kreita de Daking por disvolvi la industrion de nia lando estas sendependeco kaj sinapogo sur propraj fortoj.

En 1960, kiam komenciĝis la konstrua kampanjo ĉe Daking, imperiismaj landoj ankoraŭ daŭre faris sian blokadon al nia lando komencitan en la jaro 1949, kiam la nova Ĉinio fondiĝis, kaj ankaŭ social-imperiismo feroce premis nin. La niveloj de la industrio, scienco kaj teknologio de nia lando ankoraŭ estis nealtaj kaj la bazo de nia petrola industrio estis eĉ pli malforta. Je la Liberiĝo en 1949, la malnova socio postlasis nur du malgrandajn olekampojn de Janĉang en Ŝanhi-provinco kaj Jumen en Gansu-provinco kaj ok drilmaŝinojn kaj la jara produktokvanto de nafto

estis malpli ol centmilo da tunoj. Kvankam ni faris multe da laboro por disvolvi nian petrolan industrion post la Liberiĝo, tamen ja estis multaj malfaciloj por ekspluati modernan grandan olekamon tute nin apogante sur propraj fortoj.

Ĉu ni metu nian esperon sur helpon de imperiismo kaj social-imperiismo al ni? Tio submetus nin al iliaj komando kaj ekspluatado. Tio estas simple nepermesebla kaj ni nepre devas rektigi nian talion kaj konstruadi per ni mem. La penlaborado de Daking dum 17 jaroj pruvis, ke tiu vojo estas ĝusta.

Kelkajn ekzemplojn ni donu. Ĉu Ĉinio havas petrolon aŭ ne? Tio estis granda problemo en la kvindekaj jaroj. Eksterlandaj specialistoj de longe opiniis, ke granda olekampo povas troviĝi nur en "mara sedimenta stratumo", kie estis maro en antikveco kaj estis multaj organikaj sedimentaĵoj. Sed la plejparto de nia lando estas "kontinenta sedimenta stratumo" kie estis kontinento en antikveco, tial Ĉinio estas "malabunda je petrolo."

*Ferulo Vang Ginhi en laboro*



*Muntado de*




La elstara reprezentanto de la laborista klaso de nia lando Ferulo Vang, kiu faris grandan kontribuon en ekspluatado de Daking-olekampo, iam diris: “Tiel vasta estas nia lando. Mi ja ne kredas, ke nafto estas konservata nur sub la tero de fremdaj landoj.” Li opiniis, ke oni devas agi laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ en la verko «Pri Praktiko» kaj serĉi konkludon per ampleksa prospektorado ne timante malfacilojn. La eminenta geologo de nia lando Li Siguang, kiu estis estro de la Geologia Ministerio kaj forpasis en 1971, bone studis la geologian strukturon de nia lando kaj asertis, ke en kelkaj regionoj de nia lando troviĝas bonaj kondiĉoj por estiĝo kaj konservado de nafto. Diligenta laborado de laboristoj kaj pena strebado de sciencistoj finfine kreis sian propran teorion de petrola geologio de nia lando. La eltrovo de Daking-olekampo pruvis la teorion, kaj aliaj novaj olekampo pruvis kaj riĉigis la teorion.

Nafto elŝprucis el Daking. Sed ĝia koaguliĝa temperaturo estas alta kaj en tiu loko kun tre



La ĵura mitingo okazigita en la 1-a de majo, 1960

drilmaŝino sen grupoj



Ĉe bivakfajro laboristoj studas la verkojn de Prezidanto Maŭ “Pri Kontraŭdiro” kaj “Pri Praktiko”.







*Laboristoj kaj teknikistoj kune analizas subputan staton.*

malalta temperaturo estas malfacile kolekti kaj transporti ĝin. Iu fremdlandulo rikanis dirante: "Se via olekampo estus translokita al Indonezio, tiam ĝi bone produktus!" Post penlaborado kaj eksperimentado la Daking-anoj kreis novan teknologion por solvi la problemon, kaj en la lastaj jaroj nia lando konstruis la oletuban linion de Daking ĝis Pekino sin apogante sur propraj fortoj.

Ordinare, la produktokvanto de oleputo ofte malleviĝas kaj eĉ nuligiĝas pro malkresko de la

subtera premforto, post kiam oleputo komencis sian funkciadon. Sed nia socialisma entrepreno tre atentis pri protekto kaj plena utiligo de la naturaj riĉfontoj. La Daking-anoj trovis novan vojon en sia krea laborado por solvi tiun problemon, t.e. dum elŝpruco de nafto ili pumpas akvon subteren por teni la subteran premforton. Dank' al tio en la pasintaj 17 jaroj la meznombra produktokvanto de malnovaj oleputoj ne nur ne reduktiĝis, sed eĉ iom leviĝis. La unua oleputo borita de la Ferulo kaj liaj kolegoj ankoraŭ funkcias normale hodiaŭ. Dank' al apliko de diversaj rimedoj la procento de nafto akirebla el la tuta konservokvanto leviĝis je 15% kompare kun tiu de la projekto. Specialistoj opinias, ke tre alta estas la procento, kaj tio egalas eltrovon de alia granda olekampo.

Ankaŭ en putoborado, ili kreis rekordojn. Ekzemple, unu 1,200-metra puto estis traborita en unu tago, per nur unu borilpinto, kaj kreiĝis taĉmenta rekordo de borado de 127,000 metroj en unu jaro. La totala profundeco de la putoj boritaj de la 1205-a putobora taĉmento gvidita de la Ferulo egalas al la alteco de 96 Ĝomolangma-oj, la plej alta montopinto de la mondo kun alteco de 8,848 metroj.

Samtempe kun plenumo de la principo de sendependeco kaj sinapogo sur propraj fortoj, la Daking-anoj ne rifuzis senanalize aplikon de eksterlandaj teknikoj. Ekzemple, la supre menciita metodo de enpumpado de akvo por teni subteran premforton antaŭe jam ekzistis eksterlande. Post analizo de dekelkaj grandaj olekampoj eksterlandaj, Daking kreis la projekton pri ekenpumpo de akvo tuj je la komenco de la ekspluatado, sed ne poste, en interna parto de olekampo anstataŭ ĉe ĝia rando.

La Daking-anoj, kiuj konstruis la modernan grandan olekampon sendepende kaj sin apogante sur propraj fortoj, sentas fierecon, tamen ili estas tre modestaj. Ili firme gravuris en si la instruon de Prezidanto Maŭ: "**Ankaŭ en la estonteco kiam nia lando riĉiĝos kaj potenciĝos, ni nepre devos lerni de aliaj landoj sed ne teni la nazon supren. . . . Eĉ post dekmil jaroj ni ankoraŭ devos lerni! Ĉu estas ia malbono en tio?**"

## Pri la “Ĉarto de la Anŝan-a Fera kaj Ŝtala Kompanio”

LA “Ĉarto de la Anŝan-a Fera kaj Ŝtala Kompanio” estas la fundamenta regularo de Ĉinio por bone funkciigi socialismajn entreprenojn. Ĝi estis elmetita de Prezidanto Maŭ en marto de 1960 en sia instrukcia noto pri raporto de la Anŝan-a Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio. Laŭ la leciono ricevita en la ekonomia konstruado de Sovetunio, Prezidanto Maŭ resumis la sperton de Ĉinio kaj difinis la fundamentajn principojn por konstruado de socialismaj entreprenoj. La principoj estas: Persistado en meto de la politiko en komandan lokon, plifortigo de la gvidado de la Partio, grandskala faro de amasaj movadoj, partopreno de kadroj en fizika laboro kaj partopreno de laboristoj en administrado, reformo de neraciaj reguloj kaj sistemoj, kombiniĝo de kadroj, laboristoj kaj teknikistoj, kaj disvolvo de la teknika renovigo kaj teknika revolucio.

La “Ĉarto de la Anŝan-a Fera kaj Ŝtala Kompanio” estas lumturo gvidanta la industrion de Ĉinio en ĝia antaŭenmarŝo laŭ la socialisma vojo. Ĝia unua principo estas meti la politikon en komandan lokon. Ĝi estas la animo de la administrado de entreprenoj. Kaj la kerno de la meto de la politiko en komandan lokon estas persisti en la proleta revolucia linio de Prezidanto Maŭ, t.e. preni la klasbatalon kiel la ĉefĉeneron, ĝustigi la direkton kaj la linion de entreprenoj, kaj fari la entreprenojn firmaj pozicioj por multe, rapide, bone kaj ekonomie disvolvi socialisman ekonomion kaj firmigi la proletan diktaturon.

La Komunista Partio de Ĉinio estas la kerna forto en gvido de ĉiuj branĉoj de Ĉinio. Plifortigo de la unuigita gvido de la Partio en la entreprenoj estas la fundamenta garantio pri plenumo de la linio

kaj la politikoj de la Partio kaj rapida disvolviĝo de socialisma produktado kaj socialisma konstruado.

Grandskala faro de amasaj movadoj, partopreno de kadroj en fizika laboro, partopreno de laboristoj en la administrado de entreprenoj, reformo de neraciaj reguloj kaj sistemoj kaj kombiniĝo de kadroj, laboristoj kaj teknikistoj spegulas la mastrecon de la laborista klaso kaj la kamaradan interrilaton de iliaj interhelpo kaj kunlaboro en socialismaj entreprenoj. Pro la malsameco de laborpostenoj ankoraŭ ekzistas diferenco inter cerbolaboro kaj fiziklaboro, kaj ankoraŭ estas certaj kontraŭdiroj interne de la popolo. La fundamentaj intereso de la laboristoj, teknikistoj kaj kadroj estas unuecaj. Tiu ĉi principo difinita en la ĉarto estas gvida principo por ĝusta solvo de la interrilatoj interne de la entreprenoj kaj plena mobilizado de ĉiuj aktivaj faktoroj.

La reguloj kaj sistemoj de la socialismaj entreprenoj estas grava garantio pri plenumo de la linio kaj politikoj de la Partio kaj firmigo kaj disvolvo de la socialisma ekonomia bazo. La starigo kaj plenumo de ili dependas de la amasoj. La reguloj kaj sistemoj kiuj pruviĝis neraciaj en foj-refoja produkta praktikado devas esti reformitaj dank’ al klopodo de la amasoj. Kaj la starigo kaj perfektigo de raciaj reguloj kaj sistemoj utilas al disvolvo de la socialisma aktiveco de la laboristoj.

Strebado al altigo de tekniko por la revolucio estas grava konsistiga parto de la ideo komandi produktadon per la revolucio. Disvolvi teknikan renovigon kaj teknikan revolucion, senĉese levi la teknikan nivelon kaj konstrui grandan teknikan trupon de la laborista klaso

estas grava vojo por levi la produktivecon. Nur per senĉesa levado de la produktiveco, oni povas senĉese grandigi la socialisman ekonomian bazon kaj krei materiajn kondiĉojn por finfine venki kapitalismon kaj paŝon post paŝo transiri al komunismo.

La ĉarto starigita de Prezidanto Maŭ enkorpigis la dialektikajn interrilatojn inter la superstrukturo kaj la ekonomia bazo, inter la produktaj rilatoj kaj la produktaj fortoj, inter politiko kaj ekonomio kaj inter revolucio kaj produktado en socialismaj entreprenoj. Resume, meto de politiko en komandan lokon kaj gvido de la Partio garantias la socialisman direkton de la entreprenoj kaj estas la koncentra manifesto de la objektiva postulo de disvolviĝo de la socialisma ekonomio; grandskala faro de amasaj movadoj, partopreno de kadroj en fizika laboro kaj partopreno de laboristoj en administrado, reformo de neraciaj reguloj kaj sistemoj kaj kombiniĝo de kadroj, laboristoj kaj teknikistoj spegulas la novtipan socialisman interrilaton inter la homoj en entreprenoj. La teknika renovigo kaj teknika revolucio estas grava vojo por levi la produktivecon de socialismaj entreprenoj. Ĉio ĉi tio estas por persisti en daŭrigo de la revolucio sub la diktaturo de la proletaro, firmigi kaj disvolvi la socialisman ekonomian bazon kaj disvolvi la sociajn produktajn fortojn.

La Daking-a Olekampo — la ruĝa flago de la industria fronto de Ĉinio persone starigita de Prezidanto Maŭ, estas tipo en persisto de la proleta revolucia linio, plenampleksa plenumo de la “Ĉarto de la Anŝan-a Fera kaj Ŝtala Kompanio” kaj irado de sia propra vojo en disvolvo de la industrio de Ĉinio.



# Rememoro pri la Centra Instituto de Kamparana Movado en Vuĉang

LA Centra Instituto de Kamparana Movado de Vuĉang estis starigita de Kamarado Maŭ Zedong en la periodo de la Unua Enlanda Revolucia Milito (1924-1927) por kulturi kadrojn de kamparana revolucia movado. La kuranta jaro markis la kvindekan datrevenon de ĝia fondiĝo.

Mi havis ŝancon lerni en la instituto kaj sentas gloron kaj feliĉon pro tio. Rememorante pri la tiamaj lernado kaj batala vivo, la pasintaĵoj denove aperas antaŭ miaj okuloj.

Estis la jaro 1926, la periodo de kunlaboro inter la Komunista Partio de Ĉinio kaj Kuomintang. Tiam la nacia revolucia registaro, en kiu partoprenis kompartianoj, komencis la Norden-

Ekspedicion kontraŭ la feŭdaj militaristoj. En vintro de la jaro, la Norden-Ekspedicia Milito akiris multajn venkojn unu post alia. La laborista-kamparana movado gvidata de la Komunista Partio, precipe la kamparana revolucia movado rapide disvolviĝis tra la tuta lando, tiel ke ĝi bezonis grandan nombron da kadroj de kamparana movado. La partia komitato de Hebej-provinco sendis min kaj aliajn naŭ kamaradojn por lerni en la Kantona Instituto de Kamparana Movado starigita de Kamarado Maŭ Zedong. En la komenco de decembro mi alvenis Ŝanĥajon, kie mi aŭdis ke la Norden-Ekspedicia Armeo okupis Vuhan, kaj la Kuomintanga registaro translokiĝis tien. En tiu tempo, Kamarado Maŭ



*La malnova sidejo  
de la Centra Insti-  
tuto de Kamparana  
Movado en Vuĉang*

Zedong, kiu zorgis la laboron de la Komitato de Kamparana Movado de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, estis preparanta por starigi la Centran Instituton de Kamparana Movado en Vuhan. Mi tre ĝojis pro tio kaj decidis iri ekzameniĝi por eniri ĝin.


En iu tago de februaro de 1927, la instituto sciigis al ni, ke ni iru tien por buŝa ekzameno. En la komenco mi maltrankviliĝis pri tio. Antaŭ kelkaj tagoj ni ricevis jam skriban ekzamenon kaj nun la gvidantoj de la instituto persone faros la buŝan ekzamenon. Tiam mi pensis kun timo: Ĉu ni ne multe klerigitaj junuloj el malriĉkamparanaj familioj povos sukcese trapasi la ekzamenon? Post kiam ni eniris la ekzaminejon kaj sidiĝis, Komitatano Maŭ venis. Li en kitelo suriris la podion kaj afable ĉirkaŭrigardis ĉiujn kandidatojn kaj mem vokis niajn nomojn unu post alia. Kiam li vokis mian nomon, mi iris al la podio. Kun rideto li demandis min de kie mi venis. Kaj poste li demandis, kiom da kampo mia familio havis. Mi respondis al li ke mia familio farmas kaj havas neniom da kampo.

Komitatano Maŭ demandis plue, pri kio mi okupiĝis antaŭe, kaj kiel iris la kamparana movado en nia loko.

Mi respondis ke mi estas diplomito el normala lernejo kaj laboras kiel instruisto de elementa lernejo, la kamparana movado de nia loko estis disvolviĝanta kaj urĝe bezonis kadrojn, krome, oni ankoraŭ ne havis klaran komprenon pri la ideo de kamparana movado.

Aŭdinte tion Komitatano Maŭ tre ĝojis. Li rigardis mian skribitan ekzamenpaperon kaj skribis sur ĝi la literon C (signo por kompartiano). Post du tagoj ni aliris por rigardi la publikigitan nomliston de sukcesintaj kandidatoj. Mi rimarkis ke mia nomo estas en la dekkvina loko kaj ĉiuj ni dek venintoj el Hebej-provinco sukcesis en la ekzameno.

En la sepa de marto de 1927, la instituto komencis doni lecionon. En ĝi troviĝis sume 800 lernantoj venintaj el diversaj provincoj de la tuta lando, plej multe el Hubej, Hunan kaj Gianghi. Laboristoj kaj kamparanoj, precipe kamparanoj, kun praktika sperto konsistigis tre grandan parton de ili.



*La dormoĉambro de Prezidanto Maŭ en Vuĉang dum la periodo de vintro de 1926 ĝis aŭtuno de 1927*



*La verkinto de la artikolo Liu Ĝen rakontas al geknaboj pri lekcio de Prezidanto Maŭ en la tiama klasĉambro de la instituto.*

Komitatano Maŭ persone direktis la laboron de la instituto kaj ellaboris ĝian edukan orientilon kaj instruan planon. Li difinis ke ĝia celo estas kulturi gvidajn kadrojn por kampara revolucio por efektiviĝi kamparan revolucion kaj renversi la feŭdajn fortojn. Kaj li ankaŭ persone elektis instruistojn kaj oficistojn. Kamaradoj Jun Dajjing kaj Peng Paj, membroj de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, kaj Kamarado Fang Ĝimin, membro de la Plenuma Komitato de la Tutlanda Kamparana Asocio iam lekciis en tiu instituto.



Marksismo-Leninismo estis la ĉefa instrua enhavo de la instituto. Ni studis tie la brilajn verkojn «La Komunista Manifesto», «Analizo de la Klasoj en la Ĉina Socio» kaj «Raporto pri Esplorado de la Kamparana Movado en Hunan», kaj ankaŭ la historian sperton de la Pariza Komunumo kaj la Oktobra Revolucio, kaj lernis la kantojn «La Internacio» k.a. Komitatano Maŭ persone lektiis al ni la ĉefajn lernobjektojn “La Problemo de la Kamparanoj” kaj “Eduko de la Kamparanoj”. Prenante Marksismen-Leninismen kiel orientilon kaj en ligo kun la konkreta praktiko de la ĉina revolucio, li gvidis nian studadon pri la demandoj de agraro, regpotenco kaj armita forto de kamparanoj kaj komprenigis al ni multajn revoluciajn teoriojn.

Tiam estis ĝuste la periodo de intensa batalo inter revolucio kaj kontraŭrevolucio. La vasta revolucia popolo aplaudis la arde disvolviĝantan kamparanan revolucionan movadon. Tamen la meza kaj supera socitavoloj, precipe la dekstruloj de Kuomintango malice kalumniis ke la kamparana movado estas “malbonega”. Ankaŭ la dekstraj oportunistoj interne de la Komunista Partio de Ĉinio kun Ĉen Duhio kiel la ĉefo kalumniis, ke la kamparana movado “iris tro malproksimen”, kaj babiloj pri tio aŭdiĝis ĉie en la stratoj. Ankaŭ inter la lernantoj de la instituto tio kaŭzis nesamajn reagojn: plejparto de la lernantoj tre indignis pri la kalumnio, sed malmultaj el ili ne havis klaran ideon pri tio. Por rebati la kalumnion de la malamiko kaj altigi la politikan konscion de la lernantoj, Komitatano Maŭ persone klarigis al ni la artikolon «Raporto pri Esplorado de la Kamparana Movado en Hunan». En tiu tago pli ol 800 lernantoj, instruistoj kaj oficistoj de la instituto venis frue en la kunvenejon. Komitatano Maŭ demandis al ĉiuj, ĉu la kamparana movado estas bonega aŭ malbonega. Ni respondis: “Bonega!”

Poste li denove demandis, kial ĝi estas bonega.

Ni ne povis tuj multe diri pri ĝia boneco. Komitatano Maŭ prezentis al ni grandan nombron da faktoj, kiujn li kolektis dum sia esplorado. Li diris kun forta emocio: La kamparana movado estas tio, ke la vastaj amasoj de kamparanoj leviĝas por plenumi sian historian mision kaj ke

la demokratiaj fortoj de la kamparo leviĝas por renversi la kamparajn feŭdajn fortojn. La feŭdaj lokaj tiranoj kaj malbonaj biensinjoroj kaj la kontraŭleĝa bienula klaso formis la bazon de aŭtokratio dum miloj da jaroj kaj ili estas bazŝtono de la imperiistoj, militaristoj kaj koruptiĝintaj ŝtatoficistoj en nia lando. Renversi tiujn feŭdajn fortojn ja estas la vera celo de la nacia revolucio. En kelkaj monatoj la kamparanoj efektivigis tion, kion D-ro Sun Jatsen volis sed ne povis efektivigi en la kvardek jaroj, dum kiuj li dediĉis sin al la nacia revolucio. Tio estas mirinda atingo neniam akirita, ne nur en la kvardek jaroj, sed ankaŭ en miloj da jaroj. La kamparanoj agas tute prave, ilia ago estas bonega! Ni absorbite aŭskultis kaj notis la instruojn de Komitatano Maŭ. Li rakontis ankaŭ pri tio ke la kamparanoj kondukis malbonajn biensinjorojn per ŝnuroj parade tra la stratoj kaj ke kamparaninoj, kiuj antaŭe estis malpermesitaj eniri en la familian templon, ribelis kontraŭ la malnova etiko kaj sidiĝis en la templo por festeni. Tio estis strangaj aferoj, kiujn ni neniam aŭdis antaŭe. Kun plena entuziasmo li laŭdis la kamparanan movadon kaj rakontis vive kaj konkrete. Tiam en la klasĉambro aŭdiĝis de tempo al tempo manklakadoj.


Poste, Komitatano Maŭ forte rebatis absurdajn opiniojn ke la kamparana movado estas “malbonega” kaj “iris tro malproksimen”. Per simpla kaj viva ekzemplo li klarigis la ideon “por korekti eraron estas necese transpasi la limon de ĝusteco”. Li diris, ke por rektigi kurban bambuon oni devas ĝin fleksi kelkajn fojojn transpasinte la punkton de rekteco kaj tiamaniere fine povas rektigi ĝin. Kaj ŝvingante sian manon li diris: “‘Bonege’ estas la teorio de la kamparanoj kaj ĉiuj aliaj revoluciuloj”, sed ‘malbonege’ evidente estas teorio por bati la leviĝon de la kamparanoj en la interesoj de la bienuloj, evidente estas teorio de la bienula klaso por konservi la malnovan ordon de feŭdismo kaj malhelpi la starigon de nova ordo de demokratio, evidente estas kontraŭrevolucia teorio.” Li zorgeme instruis nin, ke ni firme staru en la fronto de la kamparana movado kaj iru al la kamparo por fari revolucion. La lernantoj, kiuj antaŭe havis malklaran komprenon, nun ricevis klaran vidon. Poste, Komitatano Maŭ lektiis al ni pri la verko «Analizo de la Klasoj

en la Ĉina Socio», kaj instruis ke ni unuiĝu kun la veraj amikoj por ataki la verajn malamikojn. Ĉiu lekcio donita de li al ni vivece inspiris nin.

La instituto de kamparana movado ankaŭ movis nin iri en la socion kaj lerni en praktiko de akra kaj komplika klasbatalo kaj la batalo inter la du linioj. Ĝi ofte invitis malriĉajn kamparanojn kaj kadrojn de kamparana movado fari raportojn, kaj sendis nin al la kamparo por fari socian enketadon, dank' al kio ni pluapase konis, sur la bazo de unuigo de teorio kaj praktiko, la gravecon de la problemo de kamparanoj kaj kial la kamparanoj estas la ĉefa forto de la ĉina revolucio. Per multaj vivaj instruaj rimedoj, ekzemple "diskuta kunveno pri demando de kamparanoj" k.a., la instituto de la kamparana movado, helpis nin studi la klasajn rilatojn en la kamparo, resumi sperton de la kamparana movado kaj eltrovi rimedon por konduki kamparanan revolucion, prenante Marksismon kiel teorion kondukilon.

Por kulturi nin en firmajn teoriajn batalantojn la instituto donis multajn atentojn pri nia konscienca reformado ideologia. Nelonge post nia eniro en la lernejon, oni kolektis nin por diskuti "kiel kondukti kiel lernanto de la instituto de kamparana movado" kaj "kiel sin purigi de diversaj influoj de la malnova socio kaj fariĝi efika revoluciilo". En tiu tempo la partia organizo en la instituto ankoraŭ estis sekreta, sed ĝia organiza vivo iris tre bone kaj ofte okazis kunvenoj de partiaj grupoj kaj partia filio. Komitatano Maŭ ofte ĉeestis kunvenojn de la filio kaj helpis nin analizi la politikan situacion, inspiris al ni, kiel ni devas ludi avangardan modelan rolon de kompartiano, kaj direktis nin en varbado de novaj kompartianoj.

La instituto de la kamparana movado rigardis trejnadon de la lernantoj en akiro de kapablo de praktika armita batalo kiel gravan lernobjekton. La lernantoj de la instituto de kamparana movado estas organizitaj kiel armeanoj. Ĉiu lernanto ricevis pafilon kaj faris duhoran militan ekzercon en ĉiu tago kaj batalan manovron en ĉiu semajno. Post kiam Ĉiang Kajŝek faris la kontraŭrevolucion puĉon de la 12-a de aprilo, nia trejnado pli intensiĝis. La tempo de militaj le-



*Klarigantino prezentis al vizitantoj armilojn uzitajn de la lernantoj de la instituto kaj rakontis al ili pri tiama milita trejnado.*

cionoj longiĝis ĝis 4 horoj en ĉiu tago. La milita ekzerco estis farita rigore laŭ la bezono de reala milito. Krom la milita ekzerco ni ankaŭ partoprenis en praktikaj bataloj por subpremado de la kontraŭrevolucia armita forto de bienuloj en iu gubernio kaj frakaso de armita ribelo de reakcia oficiro Hia Doŭĵin, de kio ni ricevis hardadon.

"Iru al la kamparo por fari grandan revolucion!" estis la batala devizo de la lernantoj de la instituto. Post intensa lernado de tri monatoj la lernejo okazigis diplomadan ceremonion en la 18-a de junio de 1927. Ĉiu lernanto ricevis kupraĵon stelan insignon sur kiu gravuriĝis ideografiaj signifantaj kamparan revolucion. Post kiam mi finis mian lernadon en la instituto, mi revenis al orienta parto de Hebej-provinco por fari laboron de kamparana movado. Poste, nemalmultaj el miaj kunlernantoj fariĝis kadroj de la kamparanaj kaj laboristaj armitaj fortoj en diversaj lokoj.

Nun, la granda gvidanto kaj instruisto Prezidanto Maŭ forlasis nin. Tamen lia brila penso ĉiam prilumigos nian vojon de antaŭenmarŝado. Sub la granda standardo de Prezidanto Maŭ kaj sub la saĝa gvido de Prezidanto Hua Guofeng ni faros ĝis la fino la proletan revolucion.



# Kadroj devas iri al la plejfronto de agrikulturo

En la lastaj jaroj, Hebej-provinco elmetis la devizon ke "por disvolvi agrikulturon la kadroj devas iri al la bazaj unuoj de la kamparo", kio signifas, ke ili partoprenu en kolektiva produkta laboro, akcelu sian ideologian revoluciigon kaj pli bone gvidu la amasan movadon de lerno de Daĝaj en agrikulturo. Tio estas unu el la gravaj rimedoj de la provinco por solvi la problemon pri serioza manko de greno. En la nomita provinco ĉiujare cent mil diversnivelaj kadroj iris al la kamparo. Nia redakcio invitis parton de la gvidantoj de Sigiaguang-subprovinco al kunsido pri tiu problemo. La invititoj estis Lju Pejju, membro de la Konstanta Komitato de la Sigiaguang-subprovinca Komitato de KPC kaj vicestro de la subprovinca revolucia komitato; Koŭ Zivej, sekretario de la Gaŭĉeng-gubernia Komitato de KPC; Li Mejju (virino), vicsekretario de la Gaŭji-gubernia Komitato de KPC; Vang Giaĝen, vicestro de la plana komitato de la urbo Sigiaguang; Tian Cangĉun, sekretario de la partia komitato de Daliĝuang-komunumo de Ŝulu-gubernio.

Ĉisube estas la protokolo pri la kunsido.

La Red.

## AFERO KUN FUNDAMENTA GRAVECO

**Lju Pejju:** Ni tre ĝojas, ke ni havas la ŝancon por konigi al la legantoj de la gazeto «El Popola Ĉinio» la staton de nia subprovinco.

Sigiaguang-subprovinco havas sume 18 guberniojn kaj urbojn. Montaro troviĝas en ĝia okcidenta parto kaj ebenaĵo en la centra kaj orienta partoj. En la historio, la ses riveroj fluantaj tra la regiono multfoje defluiĝis pro

inundo kaj ofte okazis trosekeco, inundo kaj grunda alkaligo. Antaŭ la Liberiĝo, la pohek-tara produktokvanto de greno estis 750 kilogramoj, kaj en plagaj jaroj oni fuĝis aliloken. Post la Liberiĝo, kvankam la agrikultura produkto disvolviĝis kompare rapide, tamen la produktita greno ankoraŭ ne sufiĉis por provizi la subprovincon. Ekde la granda kultura revolucio la gvidaj kadroj de diversaj niveloj profundiĝis en la kamparon, kritikis la reviziisman linion de

Lju Pejju



Koŭ Zivej



Vang Giaĝen



Li Mejju



Liu Ŝaŭki kaj Lin Biaŭ kaj kapitalisman tendencon, likvidis ilian venenon en la kamparo kune kun la komunumanoj, rompis konservativismon kaj komencis reformon de la naturo. Oni faris kelkdek grandajn kaj mezajn akvoutiligajn konstruaĵojn en la montregiono, boris pli ol 80,000 maŝinputojn sur la ebenaĵo kaj fosis milojn da grandaj kaj malgrandaj irigaciaj kanaloj, tiel ke antaŭaj dezertejoj kovrataj de sablo kaj salalkala tero estis reformitaj en fekundajn kampojn. Nun la pohektara kaj totala produktokvantoj de greno de la tuta subprovinco kreskis respektive je 81% kaj 100% kompare kun tiuj de 1965. En la pasintaj ok jaroj ĝi jam havis superfluan grenon kaj en la lasta jaro ĝi liveris al la ŝtato 420,000 tunojn da superflua greno.

**Koŭ Zivej:** En la batalo por reformi la naturon, nia gubernio, same kiel aliaj gubernioj de la provinco, lernis la sperton de Hijang-gubernio de Ŝanhi, ke diversnivela gvidanto iris al la kamparo kune kun granda nombro da kadroj, por partopreni en la kolektiva produkta laboro kaj gvidi la movadon de lerno de Daĝaj en agrikulturo. En la guberniaj institucioj ni praktikas sistemon ke triono de la kadroj iras al produktaj brigadoj por tie partopreni en fizika laboro kaj tie starigi sian laboran bazon, alia triono faras enketadon laŭ la ĉefa laboro en la kamparo kaj

la lasta triono restas en la institucioj por plenumi ĉiutagajn laborojn. La tri trionoj alternas periode.

**Lju Pejju:** Niaj subprovincaj institucioj ankaŭ praktikas la sistemon. Ĉiujare la membroj de la konstanta komitato de la subprovinca partia komitato alterne fiziklaboras unu monaton en la kamparo kiel komunumanoj.

**Tian Cangĉun:** La kadroj de nia komunumo laboras kune kun komunumanoj 8 monatojn ĉiujare. La kadroj de la produktaj brigadoj kaj taĉmentoj ne apartiĝas de produktado kaj laboras kiel komunumanoj.

**Koŭ Zivej:** Partopreno de kadroj en produkta laborado kaj tenado de intima rilato kun amasoj estas bona tradicio de nia Partio. Frue en la revoluciaj militaj jaroj, la kadroj kaj soldatoj de nia Partio kaj nia armeo disvolvis produktadon kune kun la popolanoj de la revoluciaj bazlokoj por solvi problemon de iliaj manĝaĵoj kaj vestaĵoj. Dank' al tio ili frakasis blokadon de la malamikoj kaj tiel garantiis la venkon de la revolucio.

**Li Mejgin:** Post la Liberiĝo Prezidanto Maŭ plie montris, ke partopreno de kadroj en kolektiva produkta laboro "estas afero kun funda-

*Gvidantoj de la partia komitato de Luanĉeng-gubernio al rikoltado de tritiko*

*Tian Cangĉun*





menta graveco por socialisma sistemo; ĝi utilas por venki burokratismon kaj preventi reviziismon kaj dogmismon". El mia propra travivaĵo mi profunde konis, ke tio estas nepre irenda vojo por la kadroj en daŭrigo de la revolucio.

Ni iam spertis jenan lecionon: En nia Gaŭji-gubernio estas Hebej-brigado, kiu transformiĝis de avangarda brigado en postiĝintan. En la pasinteco, la partia komitato de nia gubernio subjektive opiniis, ke ĝi posteigis pro fiereco kaj malharmonio de la gvidantoj, kaj multfoje helpis ilin korekti tiun eraron kaj plifortigi la solidarecon. Tamen ĝia produktado ankoraŭ ne boniĝis. En la pasinta jaro mi kaj kelkaj kadroj iris al tiu brigado por fari enketadon. En fizika laborado komunumanoj diris al ni, ke iuj gvidantoj de la brigado ne nur ne partoprenis en kolektiva produkta fiziklaborado, sed eĉ laŭplaĉe elspezis monon de la kolektivo por satigi sian avidecon al drinko kaj manĝo kaj toleris iujn en spekulado. Ni mobilizis amasojn malkaŝi kaj kritiki la kapitalisman tendencon kaj la burĝan vivstilon de la brigadaj kadroj, kio profunde edukis la amasojn kaj kadrojn kaj levis ilian socialisman aktivecon, ankaŭ ĝia revolucio kaj produktado multe progresis.

**Koŭ Zivej:** Iun someron la temperaturo estis malalta kaj pluvis abunde, kio serioze malhelpis la kreskadon de kotonplantoj. Kiel venki la malfacilon? Ni ne tuj trovis bonan ideon. Ni decidis iri al kotonkampoj; fizike labori tie, okazigi gubernian partian kunvenon kaj konsulti veteranajn kamparanojn kaj teknikistojn. La lastaj diris, ke profunda ŝpatado kaj varmosterko povas rezisti kontraŭ malalta temperaturo, ĉar profunda ŝpatado povas malkompaktigi supran grundon kaj ebligas al ĝi sorbi kaj konservi sunan varmon. Ni do disvastigis la bonan sperton en la tuta gubernio, kio akcelis pliprodukton de koton. De tiam ni donas grandan atenton al disvastigo de bona sperto de la amasoj. Tio estas unu el la gravaj kaŭzoj de la riĉaj rikoltoj akiritaj de nia gubernio en la lastaj sinsekvaj jaroj.


**Lju Pejju:** Granda socialisma aktiveco troviĝas en la amasoj. Nur racia organizo povas mobilizi kaj plene disvolvi tiun aktivecon. An-

taŭe al la gvidantoj de la gubernia partia komitato de Gingham mankis fido por reformi la postiĝintan fizionomion de la montregiono, kaj la pohektara produktokvanto de greno pliiĝis nur je 90 kilogramoj ĉiujare en la dek jaroj antaŭ 1975. Post la Unua Tutlanda Konferenco por Lerni de Daĝaj en Agrikulturo en 1975, lerninte la raporton faritan de Kamarado Hua Guofeng en la konferenco "La Tuta Partio Mobiliziĝu, Faru Grandan Klopodon por Disvolvi la Agrikulturon kaj Batalu por Ĝeneraliĝi la Daĝaj-tipajn Guberniojn", ili estis profunde kuragiĝataj kaj decidis iri inter amasojn por peti opiniojn. La amasoj donis al la gubernia partia komitato multajn bonajn opiniojn, kio plifortigis ĝian fidon. En la lasta jaro, la popolanoj de la gubernio sub direktado de la gvidaj kamaradoj de diversaj niveloj reformis la grundon kaj energie faris akvoutiligan konstruadon, tiel ke la irigaciata areo de la kampoj pliiĝis je 2,000 hektaroj kaj la pohektara produktokvanto de greno de tiu jaro pliiĝis je ĉ. 800 kilogramoj kompare kun tiu de la antaŭa jaro.

## POR BEZONO DE AGRIKULTURO

**Vang Giaĝen:** Nur se la gvidaj kadroj de urboj kaj industria, financaj kaj komercaj fakoj iras al la kamparo kaj persone faris enketadon, ili povas koni la bezonon de agrikulturo kaj bone servi al ĝi. Ni prenas la Ŝigiaĝuang-an

*La Jingang-a Irigacia Kanalo konstruita de Ŝigiaĝuang-subprovinco longa je 100 km., kiu povas irigacii 29,400 hektarojn da kampoj*



Partian Komitaton kiel ekzemplon. Antaŭ la somera rikolto de la lasta jaro, la unua sekretario de la urba partia komitato kaj respondeculoj de diversaj fakoj iris al la gubernioj Luanĉeng, Pingŝan k. a. por enketado. La tiaj komunumanoj diris al ili, ke ĉijare tritiko kreskas tre bone, tamen ne sufiĉas la draŝmaŝinoj. Reveninte al la urbo li tuj okazigis kunvenon por solvi tiun problemon. Nur en kelkaj tagoj la koncernaj fabrikoj faris 440 draŝmaŝinojn kaj per tio ĝustatempe subtenis la someran rikoltadon.

Puŝate de la urba partia komitato, ankaŭ la gvidantoj de ĉiuj fabrikoj de la nomita urbo klopodis por multe fari kontribuon en subtenado al agrikulturo. Ili aktive organizis fortojn por produkti kaj ripari agrikulturilojn, elkulturi laboristojn por komunumoj, helpi ilin starigi prilaborejojn de agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj kaj konstrui pumpstaciojn kaj aliajn konstruaĵojn.


**Koŭ Zivej:** Helpi malriĉajn komunumojn kaj brigadojn en disvolvado de produkto estas unu el la karakterizaĵoj de financa kaj komerca laboroj de nia gubernio. Foje, kelkaj gvidantoj de la gubernia banko faris enketadon en la kamparo kaj trovis, ke Ĝanggiaĝuang-komunumo havas malpli bonajn kondiĉojn kaj ĝia produkto disvolviĝis malrapide. Ili ne nur pruntis monon al ĝi, sed ankaŭ persone partoprenis en produktado kaj helpis ĝin plenumi la principon “**preni**

**grenprodukton kiel ĉefĉeneron kun samtempa disvolvo de la aliaj**”. Nun tiu komunumo jam havas pli ol dek specojn de flankokupoj, el kiuj la nombro de porkoj bredataj de ĝi superis la normon difinitan de la ŝtato. La disvolviĝo de la flankokupoj kaj akcelis pliprodukton de greno kaj pliigis la enspezon de la komunumanoj. La gubernia partia komitato disvastigis en la tuta gubernio la sperton de Ĝanggiaĝuang.

**Lju Pejju:** Nun en la tuta subprovinco la ĉefaj respondeculoj de la fakoj de industrio, trafiko, financo, komerco, kulturo, eduko kaj sanprotekto senescepte starigis sian laboran punkton en la kamparo. Tie ili laboras kiel ordinaj komunumanoj kaj gvidas amasojn en plenumado de la fundamenta linio kaj politikoj de la Partio kaj en disvolvo de produktado kune kun la bazaj kadroj de la kamparo.


Kurantjare, pli ol 12,000 kadroj de la tuta subprovinco iris al la kamparo por plene efektiviĝi la strategian politikon de Prezidanto Hua “**preni klasbatalon kiel la ĉefĉeneron en mastrumado de la lando**”, alte tenante la grandan flagon de Prezidanto Maŭ, kaj por profunde malkaŝi kaj kritiki la krimojn de la “**kvarpersona bando**” de Vang-Ĝang-Giang-Jaŭ pri uzurpo de la plej supera gvidanteco de la Partio kaj ŝtato kaj restaŭro de kapitalismo kune kun komunumanoj kaj levi novan tajdon de lerno de Daĝaj en agrikulturo.

*Laboristoj de iu komunuma riparejo de agrikulturaj maŝinoj en riparado*





# “Kiel ili similas al Lej Feng!”



Lej Feng

La granda komunisma batalanto Lej Feng (1940 — 1962) estis estro de la ŝofora subploto de iu trupo de ĈPLA.

Li naskiĝis en malriĉa kamparana familio de Hunan-provinco. En la malnova socio liaj avo, gepatroj kaj du fratoj mortis unu post alia pro persekutado de bienuloj kaj kapitalistoj, malsato aŭ laciĝo, tiel ke Lej Feng fariĝis senhelpa orfo ĉie vaganta.

Post la Liberiĝo li fariĝis mastro de la ŝtato kaj ekvizitis lernejon. Post diplomitiĝo el la elementa lernejo li sin okupis pri agrikultura produktado kaj laboris ankaŭ kiel kuriero, servisto, traktoristo kaj buldozisto. Ĉar li amis kaj bone faris siajn laborojn, li estis plurfoje elektita kiel avangarda laboranto, ruĝa standardportisto kaj modelo. En 1960 li estis varbita kiel soldato de ĈPLA. En la armeo li funkciis kiel vicestro kaj estro de subploto, multfoje faris meritojn kaj estis honorita per titolo “Modela Membro de la Komunisma Junulara Ligo”. En la fino de 1960 li aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio kaj poste li estis elektita kiel popola reprezentanto de la urbo Fuŝun. En la 15-a de aŭgusto de 1962 Kamarado Lej Feng oferis sian vivon en la laborposteno en sia aĝo de 22 jaroj.

Lej Feng estis komunisma batalanto kreskinta sub la nutrado de Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso. Li rigardis la verkojn de Prezidanto Maŭ kiel grenon, armilon kaj stirilon, diligente studis kaj energie praktikis ilin. En sia ordinara posteno li diligente laboris kaj oferis sian limigan vivon al senlima servado al la popolo. Li havis firman starpunkton de amo al klasaj fratoj kaj malamo al malamikoj, revolucion spiriton de ago kaj vorto en akordo, senegoisman komunisman stilon kaj sinforĝesan proletan batalvolon.

Antaŭ 14 jaroj, la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ faris surskribon: “Lernu de Kamarado Lej Feng”. Post tio leviĝis tra la tuta Ĉinio alta tajdo de lernado de Lej Feng kaj aperis multaj avangardaj personoj de la tipo Lej Feng.

Ĉisube ni prezentu kelkajn malgrandajn rakontojn pri lernado de Lej Feng.

— La Red.

## VOLONTE ESTI ŜRAŬBO DE REVOLUCIO

Hiong Hingvu estas ji-nacieca soldato de iu trupo de ĈPLA. Prenante Lej Feng kiel ekzemplon, li ĝuste traktas revoluciajn laborojn, kiujn la superulo asignis al li. En du jaroj la superulo kvarfoje ŝanĝis lian laboron, sed li ĉiam bone plenumis ĝin.

En 1975 li forlasis sian montvilaĝon kaj venis en la vicaron de ĈPLA. Por defendi la socialisman patrolandon li diligente sin trejnadis en milita tekniko. Dum ekzercado de pafado li kuŝis sur la ventro en pluraj horoj, kaj dum grenadjetado li sin montris vicleplena kiel en tago tiel en nokto. Dank' al tio li senĉese progresis en la ekzercado. Ĝuste tiam laŭ la ordono li estis transpostenigita al kuirista subplotono.

En la komenco post veno al la nova posteno li neniel povis sin kvietigi rigardante jen manĝilaron, jen la bruantan ekzercejon. La subplotonestro faris kun li korverŝan interparolon, kune kun li lernis la verkon de Prezidanto Maŭ «Servu al la Popolo» kaj rakontis al li pri Lej Feng, kiu volonte estis revolucia ŝraŭbo kaj bone laboris ĉie kie li postenis, kio multe inspiris lin. Li do modeste konsultis veteranajn soldatojn kaj rapide ellernis kuiran arton. Foje la trupo plenumis taskon en iu montregiono, kie la trafiko estis tre malfacila, kaj legomoj estis malfacile akireblaj. Li do, kune kun aliaj kamaradoj de la subplotono, ĉiamaniere klopodis por bone nutri la trupon, kreskiginte sojfabajn ĝermojn kaj farinte sojkazeon.

Poste, li dufoje estis sendita al aliaj subplotonoj kaj bone plenumis sian taskon. En la

pasinta aŭtuno frue venis frostiĝo kaj estis malfacile zorgi la rikoltitajn legomojn. La gvidantoj asignis al li zorgon pri legomkelo. Ĝi estis malvarma kaj humida, tamen li neniam plendis pri tio.

## KARULOJ

Soldatoj Vu Bin kaj Malgranda Ĝang estis serĉantaj ĉevalon en neĝvento. Subite ili aŭdis ploradon de infano. Ili tuj sin direktis tien, de kie venis la plorado, kaj vidis, ke maljunulino kun infano malfacile iris en la neĝvento.

Post pridemando ili informiĝis, ke la avino loĝas en vilaĝo fore je pli ol 5 kilometroj kaj estis revenanta de sia parenco. La patro de la infano promesis, ke li veturigos ilin revenen per ĉaro, tamen li ne venis post longa atendado.

La du soldatoj decidis unue akompani la avinon hejmenreveni kaj poste serĉi ĉevalon. Timante ke la infano malvarmumiĝos, Vu Bin malfermis sian palton kaj metis ĝin en sian sinon. Ankaŭ Malgranda Ĝang demetis sian palton kaj ĝin metis sur la avinon.

Rigardante jen Vu Bin portantan la infanon en la brakoj, jen Malgrandan Ĝang portantan por ŝi la korbon, la avino pensis en si: "Kiel ili similas al Lej Feng!"

Apenaŭ ili atingis la vilaĝon, ili aŭdis henon de ĉevalo. Tuj poste ili vidis, ke iris renkonte al ili kelkaj komunumanoj kun lanterno en mano kaj tirante ĉevalon. Alpaŝinte Vu Bin kaj Malgranda Ĝang ĝoje kriis de tio, ke la ĉevalo alkondukita de la komunumanoj estis ĝuste tiu kiun ili devis trovi kaj la ĉevaltiranto estis ĝuste

*Antaŭ sia morto Lej Feng estis eksterlerna instruisto de la Gianŝe-strata Elementa Lernejo de la urbo Fuŝun.*





la patro de la infano, kiu prokrastis la veturigon de la avino kaj infano pro kapto de la ĉevalo.

### VENDISTINOJ BONVENAJ AL POPOLAMASOJ

Iun tagon maljuna avino Jaŭ Ĉengĝen iris al la grenvendejo "La Oka de Marto" por interŝan-



*Soldato de la subploto "Lej Feng" helpas onklinon loĝantan en najbareco de la garnizono en aĉeto de greno.*



*Batalanto de ĈPLA garnizonanta en Liangŝan-regiono de Siĉuan-provinco rakontas al Ji-naciecaj geknaboj pri Lej Feng.*

ĝi ricinan semon kontraŭ nutra oleo. Post pesado de la ricinsemoj la vendistino Hju Dong-e diris al la avino: "Per la semoj vi povas ricevi 0.6 kilogramon da oleo." Avino Jaŭ maltrankvile diris: "Mi kunportis botelon, kiu povas enteni nur 0.5 kilogramon da oleo. Kion fari?" Tiam Hju Dong-e elprenis pli grandan botelon kaj diris afable: "Avino, ne maltrankviliĝu, vi uzu tiun." La avino tre kortuŝiĝis kaj diris: "Vi ja estas servemaj, kaj mi devas multe danki vin." Malgranda Hju diris: "Ne indas, tio estas nia devo."

Post la fondiĝo de la grenvendejo en la fino de 1975, ĝiaj kvin junaj vendistinoj bonege plenumis sian laboron en aĉetado, vendado, konservado kaj prilaborado de greno. Krome ili faris multajn aliajn laborojn por favori la komunumanojn, ekzemple ili pruntedonas vektojn, sakojn, ŝnurojn, kudrilojn kaj eĉ revoluciajn librojn, vendas poŝtmarkojn kaj kovertojn, kaj pro tio ili estas varme bonvenaj al kaj laŭdataj de la amasoj.

### SENEGOISMO

Iun tagon la partia komitato de Huangtukan-komunumo de Liaŭning-provinco ricevis poŝtpakojn, en kiu estas kvar libroj kaj letero. La lettersendinto petis la partian komitaton serĉi por li iun intelektan junulinon, kiu brave savis infanon falintan en akvon malgraŭ vivdanĝero, kaj transdoni la librojn al ŝi. Post enketado la partia komitato fine trovis tiun junulinon. Ŝi estas membro de la Komunisma Junulara Ligo Luan Ŝuhua.

La afero tiel okazis: Luan Ŝuhua veturis aliloken pro laboro. Survoje, apenaŭ ŝi descendis de aŭtobuso, ŝi aŭdis akran helpkrion. Ŝi do pafis sin laŭ direkto de la vokado kaj vidis infanon falintan en akvon tra glacia truo. En tiu kriza momento ŝi senhezite saltis en la frostan akvon kaj suprenlevis la infanon. La infano elsaviĝis. Rigardante la malsekigitan junulinon, la ĉeestantoj tre kortuŝiĝis kaj laŭdis, ke ŝi ja estas bona junulino de la tipo Lej Feng. Kiam oni petis ŝin diri sian nomon, ŝi modeste diris: "Tio estas farenda por mi."



# En nova lernojaro

de GONG VEN

**L**A horloĝo ĵus batis la sepan. La lerneja korto plenis je brilo de aŭroro. Gaje interbabilantaj lernantoj venis kvar- aŭ kvin-ope en la lernejon kaj la kvieta korto tuj vigliĝis. Iuj ekludis kor-bopilkon, volejbalon kaj tablotenison, kaj aliaj ekpurigis la sportan placon kaj la koridorojn.

“Bonan matenon, geknaboj!”

“Bonan matenon, instruisto!”

Ankaŭ instruistoj venis partopreni en la aktivado de la lernantoj.

Tiamaniere komenciĝis tago en la Lernejo de Ĉangĉun-strato de Pekino. Ĝi estas lernejo de 10-jara kontinua lernosistemo ĵus disvolvita el elementa lernejo. Nun ĝi havas 9 klasojn kun pli ol 2,700 lernantoj dividitaj en 58 grupoj. Tiu ĉi estas la unua lernojaro post la faligo de la “kvarpersona bando” de Vang, Ĝang, Ĝiang kaj Jaŭ, kaj la tuta lernejo aspektas vivecplena.

## EN KLASĈAMBRO

La sonorilo sonoris la komencon de leciona horo. Kiam la instruisto de ĉina lingvo enpaŝis la klasĉambro de grupo A de la trijara klaso, la 39 lernantoj ĉiuj stariĝis por saluti la instruiston je ordono de la grupestro. Kun rideto la instruisto riverencis al la lernantoj kaj ĉi tiuj sidiĝis. Hodiaŭ la leciono temis pri fabelo “Ekpluvos”. En la ĉambro regis silento kaj ĉiuj aŭskultis absorbite. Fininte la klarigadon, la instruisto dividis la lernantojn en grupetojn por

diskutado. Rapide formiĝis kvarpersonaj grupoj kaj komenciĝis mallaŭta diskutado.

En ĉiuj klasĉambroj de la lernejo ĝenerale regas tia bona ordo. Tio ĝojigas la koron de la instruistoj. En la pasinteco, la “kvarpersona bando” ĉiamaniere subfosis la edukatan revolucion, oponante kun kontraŭrevolucia intenco kontraŭ la instruado de Prezidatno Maŭ pri plenampleksa progresigo de la lernantoj en moralo, intelekto kaj fiziko. Ili plenenergie agitis anarkismon kaj serioze korodis la geknabojn kaj gejunulojn, kriante ke la lernejoj devas elkulturi homojn “kun kornoj sur la kapo kaj pikiloj sur la korpo”. Sub la gvido de la partia filio, tiu lernejo faris batalon kontraŭ tio, tamen ĝi ne povis tute eviti ĝenadon, kaj aperis ĉe ĝi malfruigo al leciono kaj malbona ordo en klasĉambroj. Nun la instruistoj kaj lernantoj plialtigis sian politikan konscion en malkaŝado kaj kritikado de la kontraŭrevoluciaj krimoj de la “kvarpersona bando”. La lernejo starigis raciajn regularojn kaj faris rezolute edukadon pri revolucia disciplino. Post la komenco de la nova lernojaro evidenta sukceso jam estas atingita en tio.

## POR BONAJ SUKCESOJ EN LERNADO


En la lernejo, pli kaj pli intensiĝas la studemo de la lernantoj por servi al la revolucio.

En la pasinteco, la “kvarpersona bando” senbride kreis haŭson por malhelpi geknabojn en





*Intruisto helpas ilin en postleciona horo.*



*Ili veturigas kriplan kunlernantinon hejmen.*

lernado, kaj ili eĉ starigis kun kaŝita celo “modelon” de fuŝa ekzamenato, farante ekstreme malbonan influon. La instruistoj diris kun bedaŭro, ke ili tre maltrankviliĝis pro misfaroj de la geknaboj, kiuj estas la nova generacio de la patrolando kaj daŭrigantoj de la revolucio.

Je la komenco de la nova lernojaro, krom plifortigo de la morala edukado, la lernejo publikigis serion da regularoj pri disciplino kaj ekzamenado kaj multe aktivigis la lernantojn per tio. Iuj lernantoj diris: “Nia lando efektivigos modernigon de la industrio, agrikulturo, nacidelfendo, scienco kaj tekniko en tiu ĉi jarcento. Kiel ni povos daŭrigi la revolucion, se ni ne bone ellernos kulturajn kaj sciencajn sciojn?” Tiuj kiuj lernis bone, nun lernas ankoraŭ pli diligente, kaj tiuj kiuj havis malbonan fundamenton, nun klopodas kuratingi la antaŭirantojn. Post leciona horo, lernantoj ofte ĉirkaŭas sian instruiston por demandi pri nekomprenejoj. Al lernantoj, kiuj ne bone lernas fremdan lingvon, la instruistoj donas apartan helpon en postlecionaj horoj, kaj klopodas multe kontaktiĝi kun ili por interparoli kun ili per la lernata fremda lingvo.

En tiu ĉi lernojaro komenciĝis lekciado pri la angla kaj araba lingvoj al la lernantoj de la trijara klaso, kaj ili studas la lingvojn tre diligente.

#### **BONAJ HOMOJ KAJ BONAJ AFEROJ**

La 4-an de marto, okaze de la 14-a datreveno de la naskiĝo de la brila surskribo de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ “lernu de Kamarado Lej Feng”, la lernejo okazigis kunvenon en kiu laŭditaj estis la bonaj homoj kaj bonaj aferoj aperintaj en lernado de Lej Feng. Iuj lernantoj redonis trovitajn brakhorloĝojn al la perdintoj, aliaj brave partoprenis en estingo de brulego. Por levi novan altan tajdon de lernado de Lej Feng, ĉiuj lernogrupoj eldonis nigratabulan gazeton, en kiu aperis fragmentoj el la taglibro de Lej Feng kaj artikoloj por laŭdi bonajn homojn kaj bonajn aferojn. La lernogrupa C de la okjara klaso organizis diversajn servogrupetojn por rakonti pri herooj al lernantoj en la unujara klaso, fari fonetikajn kartojn por instruistoj, ripari tablojn kaj seĝojn por la lernejo kaj helpi kunlernantojn, kiuj postiĝis en lernado. Iu lernantino de la naŭjara klaso kripliĝis kaj ne povas piediri, 6 kunlernantinoj ĉiutage portas ŝin al kaj de la lernejo per ĉaro. Nun, en lernejoj, en aŭtobusoj, en restoracioj kaj legomvendejoj, ĉie oni povas trovi lernantojn kiuj servas al la amasoj en postlecionaj horoj.

La bona tradicio de respekto al la instruistoj kaj amo al la lernantoj estas restarigita kaj disvolvata. La diligenta laborado de la instruistoj estas respektata kaj laŭdata de la lernantoj, iliaj gepatroj kaj la tuta socio. Iu instruisto kiu okupiĝis pri eduka laboro por multaj jaroj emocie diris al mi: “La ‘kvarpersona bando’ instigis la lernantojn oponi kontraŭ la instruistoj, la instrua laboro estis ne atentata kaj instruistoj estis malestimataj. Nun tute aliĝis la situacio. Okaze de la Printempa Festo de la kuranta jaro, la eduka departemento de Pekino aranĝis specialan artan prezentadon por ni. Iuj el la programeroj temis pri instruistoj kaj tre kortuŝis la spektantojn. Ni certe bone flegados la daŭrigantojn de la revolucio kaj laborados kiel bonaj ‘ĝardenistoj’ de socialismo.”



*Ekzerco de kantodanco*

## **Geesperantistoj el Nov-Zelando kaj Aŭstrio en Pekino**

Antaŭ la fino de aprilo s-ino Ellen Lymburn, nov-zelanda esperantistino, venis al Pekino kiel ano de turist-grupo de Novzelanda-Ĉina Societo. Tio estis la dua fojo, ke ŝi vizitis Ĉinion. Ĝoja intervidiĝo kaj babilado okazis inter ŝi kaj laborantoj de la redakcio de El Popola Ĉinio. Kvankam iom grandaĝa, s-ino Lymburn estas ĉiam aktiva en loka Esp. movado okupante sin pri la gvido de Esp. kursoj kaj aliaj agadoj. Ŝi vizitis ankaŭ aliajn ĉinajn urbojn kune kun sia grupo.

En la komenco de junio S-ro Felix Loffler, aŭstria esperantisto, vizitis Pekinon kiel ano de turist-grupo kaj li intervidiĝis kun laborantoj de nia redakcio.

La nov-zelanda kaj aŭstria geesperantistoj alportis al la ĉinaj esperantistoj salutojn respektive de la esperantistoj de siaj landoj, kaj nia redakcio petis ilin transdoni niajn salutojn al iliaj samlandanoj.

## **Universala Kongreso en Islando**

La 62-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Rejkjaviko, Islando, de la 30-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto en la kuranta jaro. La Alta Protektanto de la Kongreso estas la islanda ŝtatprezidanto D-ro Kristjan Eldjarn, kiu jam afable konsentis persone ĉeesti la solenan inaŭguron.

La antaŭkongreso sub aŭspicio de UEA okazos en Stirling, Skotlando. Tie estos farataj prelegoj

pri la ĝenerala temo “Esperanta kaj skota kulturoj”.

Kiel kutime malfermiĝos kadre de tiu ĉi Kongreso Internacia Somera Universitato, kies prelegoj plejparte rilatas al la kongresa ĉeftemo pri komunikado.

Al la Kongreso jam aliĝis pli ol mil esperantistoj el ĉirkaŭ kvar-dek landoj.





# Intervjuo kun J. Ivens kaj M. Loridan

de GJU HINHUA

**D**E la jaro 1976 prezentiĝis en pli ol dek landoj inkluzive de Francio, Belgio, Kanado, Anglio kaj Okcidenta Germanio, la granda kolora dokumenta filmo «Montotranslokado Fare de Malsaĝa Avo» montranta la revolucionan batalan vivon de la ĉina socio. La farintoj de tiu filmo Jolis Ivens, fama nederlanda reĝisoro, kaj Marceline Loridan, franca kinematografia laborantino, gastis en Ĉinio en februaro de la kuranta jaro kaj ni intervjuis ilin kun plezuro.

Sinjoro Jolis Ivens, nun ĉ. 80-jara, longe okupiĝis pri revolucia kina afero kaj estas unu el la pioniroj de dokumenta filmo. Li havas renomon internacian kaj estas nomata Fluganta Nederlandano. En dekoj da jaroj, li faris grandan kvanton da revoluciaj dokumentaj filmoj. Kie iris popola batalo por justeco, tie li aktivis. Li faris dokumentajn filmojn pri la defendo de Madrido fare de la hispana popolo, pri la kamparana insurekcio en suda Italio, pri la batalo de la indonezia popolo kontraŭ koloniismo kaj pri la kontraŭsona nacisava batalo de la vjetnama kaj laosa popoloj ktp., por prikanti la heroan bataladon de la popolo kaj malkaŝi la barbarajn de ĝiaj malamikoj.

Loridan bone kunlaboris kun J. Ivens kaj ili faris kune nemalmultajn bonajn filmojn. La filmo «Montotranslokado Fare de Malsaĝa Avo» estas unu el la fruktoj de ilia diligenta laborado.

La nomita filmo konsistas el 12 memstaraj filmoj, kiuj spegulas diversajn facetojn de la ĉiutagaj laboroj, lernado, vivo kaj batalo de

la ĉina popolo, formantajn en tuto kolorriĉan bildon pri la revolucia vivo de la ĉina popolo. La tuta filmo daŭras 12 horojn. Kun klara starpunkto kaj sia originala artstilo, la reĝisoro vivece, subtile kaj profunde priskribis la grandajn fruktojn akiritajn en la Granda Proleta Kultura Revolucio de Ĉinio kaj la novan spiritan fizionomion de ĝia popolo.


La filmo ĝuis varman akcepton ĉe la spektantoj. Laboruloj de multaj landoj ĝin laŭdis dirante, ke en la filmo oni povas vidi la novajn homojn, novan penson kaj novajn morojn kiujn Prezidanto Maŭ volas krei kaj ke la filmo ebligas al ili vivi kun la ĉina popolo dum 12 horoj.

J. Ivens kaj M. Loridan diris al ni, ke ili baptis la filmon per la nuna nomo pro tio, ke ĝi estas diro de Prezidanto Maŭ Zedong, figura, viveca kaj impresiva. La ĉina popolo ne nur formovis la tri montegojn ĝin subpreminta, sed ankaŭ konstruas sian landon kun obstina sistemo kaj firma fido hodiaŭ post la venko. Ĉe tio J. Ivens ĝoje diris, ke ili alprenis tiun titolon por la filmo post longa pripenso, ĉar ĝi estas riĉa je ĉinaj koloroj, fortimpresa kaj karakteriza.

J. Ivens havas altan devsenton al sia afero, strebas ĉiam al plibonigo de la tekniko kaj senĉese serĉas novon en arto. Li diris al ni, ke dum farado de tiu ĉi filmo, li faris zorgan esploradon kaj vastan enketadon. M. Loridan uzis

duonjaron por kolekti opiniojn de diversaj socitavoloj, precipe de laboristoj, en kvin landoj inkluzive de Francio kaj Belgio, antaŭ la komenco de la filmado. M. Loridan diris, ke ili resumis poste tiujn opiniojn en pli ol 200 demandojn, kiuj montris al ili, kion la okcidentaj spektantoj volas scii pri Ĉinio. Tiu antaŭpreparo multe helpis ilin en farado de tiu filmo. J. Ivens daŭrigis, ke por ke la spektantoj konu veran Ĉinion, ili aplikis la metodon de rekta spegulado, nome lasi laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn mem paroli, la realan vivon reaperi sur la ekrano kaj la spektantojn mem fari juĝon.

En printempo de 1972, J. Ivens kaj M. Loridan venis al Ĉinio por komenci la filmadon. Ili trairis preskaŭ la tutan Ĉinion kaj laboradis tage kaj nokte sub la helpo de ĉinaj kinlaborantoj. Dum filmado pri iu pekina fabriko, ili loĝis en ĝi, laboris kaj manĝis kune kun la laboristoj kaj ofte gastis ĉe iliaj domoj. Ili konis preskaŭ la nomojn de ĉiuj loĝantoj ĉirkaŭ la sama korto kaj bone konis ilian staton. La tieaj infanoj intime nomis Ivens onklo kaj Loridan onklino. Por filmi iun apotekon en Ŝanhajo, ili observadis en ĝi dum ĉiuj laborhoroj por du semajnoj. Sur Kunes-stepo de Hingiang ili loĝadis en tendo kaj laboradis sub la ĉielo. Kiam ili malsatiĝis, ili prenis sekan manĝaĵon, kaj kiam ili laciĝis, ili sidis ripoze sur la tero. En iu fiŝista vilaĝo ĉe Bohaj-golfo, ili veturis surmare kun fiŝistoj kaj filmadis malgraŭ vento kaj ondegoj. La penemo,



*Vicprezidanto Je Gianjing intervidi-  
ĝas kun J. Ivens kaj M. Loridan.*

sentimeco al malfaciloj kaj nelacigebleco de J. Ivens montritaj en laborado profunde kortuŝis la ĉinajn kamaradojn laborantajn kun li. Dum produktado de la filmo, J. Ivens kaj M. Loridan persone redaktis la filmon, poluris la klarigojn, disdonis propagandajn presasojn inter popolamasoj, respondis demandojn de ĵurnalistoj kaj iafoje eĉ kunsidis kun spektantoj. Kiam ni vidis sur ekrano, ke J. Ivens kaj M. Loridan petas opiniojn de amasoj starante antaŭ kinejoj en frostoj, ni estis kortuŝitaj. Ili vere estas entuziasmaj geamikoj de la ĉina popolo.

La filmado de tiu eminenta verko de revolucia realismo «Monto-translokado Fare de Malsaĝa Avo» daŭris pli ol 4 jarojn kaj estis ĝenata de la «kvarpersona bando». Sed ilia intrigo ne sukcesis. J. Ivens ĝoje diris, ke la filmo ne estis malbone influita de la «kvarpersona bando» nur dank' al helpo de Ĉefministro Ĝou. Tiu direktis ilin en ĉiu kriza momento, kaj eĉ dum la kriziĝo de lia malsano, li anko-

raŭ subtenis firme ilian laboron. Kun forta mangesto J. Ivens diris emocie, ke lia amika rilato kun la ĉina popolo estas tre grava kaj tre riĉa parto de lia politika vivo. Same kiel la ĉina popolo li amas Prezidanton Maŭ Zedong kaj la Komunistan Partion de Ĉinio. Li estas feliĉa, ke li konas la ĉinan popolon kaj la ĉinan Kompartion kaj li sentas apartan fieron, ke li tre frue konatiĝis kun Ĉefministro Ĝou Enlaj, kiu donis al li multajn konsilojn kaj helpojn.

Jes, la revolucia amikeco inter J. Ivens kaj la ĉina popolo estas tre profunda. Frue jam en la batalaj jaroj de la Kontraŭjapana Rezistmilito li vizitis Ĉinion. Kaj poste li 13-foje vizitis Ĉinion kaj 6-foje intervidiĝis kun Ĉefministro Ĝou. Li tre amas Ĉinion kaj entuziasme propagandis pri la nova Ĉinio. En 1938, kiam la japanaj invadantoj tretadis la ĉinan teron per feraj hufoj, J. Ivens venis al Ĉinio kun batala fervoro. Trarompinte la malhelpojn de la Kuomintang-a reakciularo kaj venkinte multajn

malfacilojn, li faris dokumentan filmon, en kiu li prezentis niajn estimatajn kaj amatajn Kamaradojn Ĝou Enlaj kaj Je Gianjing, la militan situacion de la liberigita regiono sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio estrata de Prezidanto Maŭ Zedong, varme prikantis la heroecon de la ĉina popolo brave batalanta sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio kontraŭ la japanaj agresantoj kaj stimulis la batalvolon de la popoloj kontraŭ faŝismo. Kamarado Ĝou Enlaj, tiam laboranta en la Hankou-a Oficejo de la Okavoja Armeo, amike intervidiĝis kun li kaj prezentis al li ĉinajn kinolaborantojn el Jan-an. Je sia foriro, J. Ivens donacis al la ĉinaj kinolaborantoj sian kinkameron kaj 2,000 metrojn da filmo kiujn li portis kun si. Tio estis la unua kamero ricevita de la liberigita regiono de Ĉinio. Ĝi estas simbolo de la solidareco inter internaciaj komunistoj. Per tiu kamero ĉinaj kinolaborantoj filmis la brilan figuron de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ, lian grandan revolucionan praktikon kaj multajn tre valorajn historiajn materialojn de nia revolucio. Tiu kamero faris valoran kontribuon en disvolvo de la revolucia kinoafero de nia lando.

Post la venko de la revolucio de la ĉina popolo, J. Ivens plurfoje venis al Ĉinio. En la komenca periodo post la Liberiĝo, li laboris kiel konsilanto de la Centra Studio de Dokumentaj Filmoj kaj elkulturis, en strikta kunlaboro kun ĉinaj laborantoj, konsiderindan nombron da junaj kinoteknikistoj de la nova Ĉinio. En la ardaĵoj de la granda antaŭensalto, J. Ivens faris la dokumentan filmon pri la nova Ĉinio «Frua Printempo» kaj entuziasme prikantis per ĝi la grandajn venkojn gajnitajn de la ĉina popolo post la Liberiĝo. Baldaŭ poste, li faris, en kunlaboro kun ĉinaj kinolaborantoj, la dokumentan filmon «Hurlo de 600-miliona Popolo», kiu plene spegulis la firman



subtenon de la ĉina popolo al la justa kontraŭagresa batalo de la libana popolo. Post tio, li veturis al multaj lokoj, vaste kontaktiĝis kun ĉinaj laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj starigis profundan amikecon kun ili dum siaj vizitoj al Ĉinio. En la tempo kiam ŝtorme disvolviĝis la Granda Proleta Kultura Revolucio en Ĉinio, internacie imperiistoj kaj reviziistoj kalumniis kaj atakis Ĉinion kaj ankaŭ iuj el niaj amikoj ne tre bone komprenis la revolucion, J. Ivens ree faris vizitadon en Ĉinio, persone spertis la grandajn ŝanĝojn okazintajn en tiu revolucio kaj decidis fari ampleksan dokumentan filmon por prikanti la Grandan Proletan Kul-

turan Revolucio en Ĉinio kaj faris kontribuon al la batalo de la revoluciaj popoloj de la mondo kontraŭ imperiismo kaj reviziismo, uzante kinon kiel armilon. En 1971, J. Ivens komunikis sian longe kovitan ideon al Ĉefministro Ĝou. Ĉefministro Ĝou varme subtenis lin kaj kuraĝigis lin disvolvi siajn talenton kaj stilon. La prizorgo de Ĉefministro Ĝou plenigis lin per fido kaj forto. Ĉifoje li venis al Pekino ĝuste je la unua datreveno de la forpaso de Ĉefministro Ĝou. Finrigardinte la filmojn «Eternan Gloron al la Granda Gvidanto kaj Instruisto Prezidanto Maŭ Zedong» kaj «Eternan Gloron al la Estimata kaj Amata Ĉefministro Ĝou Enlaj»,

li longe ne povis stariĝi. Ne povante regi sian fortan malĝojon en la koro, li ekploris firme brakumante ĉinan kamaradon. Li diris al ĉinaj amikoj: “Kiel ni volis, ke Ĉefministro Ĝou rigardu la filmon «Montotranslokado Fare de Malsaĝa Avo»! Ni ja tute ne atendis, ke li jam forlasis nin.”

J. Ivens verŝis sian profundan amon al Prezidanto Maŭ kaj Ĉefministro Ĝou kaj sian profundan amikecon al la ĉina popolo en tiun filmon. La sincera amo de J. Ivens kaj M. Loridan al la ĉina popolo kaj la belaj plezurplenaj tempoj kiujn ili pasigis kune kun la ĉina popolo ĉiam konserviĝos en nia memoro.



**L**A zoologia grupo de la Sinteza Esplor-taĉmento de la Ĉina Akademio de Sciencoj pri Kinghaj-Tibeta Altebenaĵo plurfoje faris esploradon en la nomita altebenaĵo en la lastaj jaroj, intertempe la grupo pasigis du monatojn en Ĉaju de la sudorienta parto de la altebenaĵo. La bela kaj fekunda loko donis al la grupanoj profundan impreson.

### FEKUNDA LOKO DE TIBETO

En la mezo de junio, ni atingis la gubernian urbon de Ĉaju. Ĝi estas alta je 2,327 metroj super la mar-nivelo. Ĝia klimato estas modere varma kun la jara meznombra temperaturo de ĉ. 12° C. Preter ĝia okcidenta flanko pasas la orienta branĉo de Ĉaju-rivero. Sur la montoj ĉirkaŭe kreskas Junnan-aj pinoj, kiuj ŝatas varmon. En la montvaloj troveblas ĉiamverdaj larĝfoliaj arboj. Ambaŭborde de la rivero ora tritiko maturiĝis kaj

pomoj kaj piroj peze klinis la branĉojn.

Laŭ la branĉo de Ĉaju-rivero okcidenten, la tereno pli kaj pli malaltiĝis, la klimato fariĝas pli varma kaj pluvo pli multa. Krom grandareaj Junnan-aj pinaroj, kreskas prospere ankaŭ densaj ĉiamverdaj larĝfoliaj arboj, baŝoj kaj pizangoj, teaj kaj mandarinaj arboj sur la montoj kaj akvomelonoj, kukurboj, kukumoj, fazeoloj, pizoj, ajloj kaj aliaj plantoj. Tiu ĉi loko estas la ĉefa produkto de rizo, kies kultura areo okupas 75% de tiu de la nomita aŭtonoma regiono kaj la produktokvanto pliiĝis seĉese.

La favora klimato havigas al Ĉaju ne nur riĉfontojn de arbaro kaj medicinajn plantojn, sed ankaŭ tiujn de bestoj kaj birdoj. Inter ili troviĝas raraj leopardo kaj arbara moskulo (*Moschus berezovskii*), ankaŭ lutro, fojno, simio, azena antilopo (*Capricornis suma-*

*traensis*), resuso, urso-simio (*Macaca assamensis*), sovaĝa kato (*Felis bengalensis*), ora kato (*Felis temminckii*), ruĝa vulpo, ruĝa pando, ŝtona kapro (*Naemorhedus goral*), rok-kaprio (*Pseudois nayaur*) k. a., kaj la birdoj, *Aethopyga gouldiae*, *Crossoptilon crossoptilon*, *Ithaginis cruentus* kaj turto. El ili la nombro de turtoj estas plej multa. La turto estas grasa kaj dika, kaj ĝia viando estas bongusta. La faŭno de tiu regiono posedas karakterizaĵojn de tropikaj kaj subtropikaj bestoj, multaj el kiuj troviĝas ankaŭ en ia sudaj partoj de nia lando. Tial oni nomas Ĉaju fekunda loko de Tibeto simila al la sudo de Jangzi-rivero.

### NOVA MONTVILAĜO DE LA ALTEBENAĴO

Ni venis al Dongkiong-vilaĝo. Tie loĝas ĉefe tibetanoj kaj deng-  
oj

## Ĉaju

de FENG ZUOGIAN kaj  
GIANG ĜIHUA

kaj parte ankaŭ hanoj, kiuj kune ekspluatas kaj konstruas la sudokcidentan landliman regionon de la patrolando. De altaĵo ni vidis, ke la vasta arbaro etendiĝas onde ĝis nevidebleco; en proksimo nove konstruita ŝoseo zigzage preterpasis lignajn domojn orde vicigitajn, en kiuj loĝas deng-oj. Laŭdire, la vilaĝo estas fondita antaŭ ne-longe. En la malnova socio Ĉaju estis malriĉa kaj postiĝinta. Ĉi tie vagis rabobestoj, venenaj serpentoj, sangsuĉaj moskitoj kaj tabanoj, kaj la reakciaj regantoj uzis la lokon kiel ekzilejon por puni sklavojn. La deng-oj loĝis sur altaj montoj generacio post generacio kaj vivtenis sin per primitivaj terkulturaj rimedoj. Mankis al ili sufiĉa vestaĵo, mankis ankaŭ kulturo kaj medicino. Ili estis ofte plagitaj de malsanoj. Nur post la Liberiĝo, sub la gvido de la Komunista Partio la deng-oj translokiĝis de sur montoj al tiu loko post la demokratia reformo. Ili ne nur ellernis agrikulturan teknikon, eĉ sendis siajn elitajn gefilojn al universitato kaj vivas ĉiam pli feliĉe.

La sekvintan tagon post nia alveno, ni komencis nian esploradon. La natura pejzaĝo estas tre ĉarma, precipe en mateno. Diversspecaj turdoj petolas flugante inter arbustoj, kukoloj rukulas en profundo de arbaro, aroj da papagoj flugas super arbaro, ankaŭ diverskoloraj papilioj dancas inter floroj, niaj okuloj ne povis akcepti ĉiujn belajojn.

### ĈASO DE URSO

En la lasta tagdeko de julio, ni alvenis al alia montvilaĝo fore je pli ol 20 km norde de Dongkiongvilaĝo. Tie multas nigraj ursoj. En aŭgusto kaj septembro, sovaĝaj persikoj kaj aliaj fruktoj maturiĝas, kaj la nigraj ursoj, kiuj tre ŝatas tiujn fruktojn, ofte eliras por serĉi manĝaĵon. Tiam estas bona tempo por ĉasado.

Iun vesperon ni trovis nigran urson en arbaro, ĝi distancis de ni

nur pli ol 20 metrojn. La vidpovo de la urso estis malbona, tial ĝi ne trovis homojn antaŭ si kaj stulte iris antaŭen. Ni kaŝiĝis post granda arbo kaj direktis nian pafilon al ĝia brusto. Paf! La urso falis surteren.

Ĝi estis ursino pezanta je pli ol 50 kg. En la nokto ni sekcis ĝin kaj preparis specimenon. En ĝia stomako troviĝis multaj termitoj kaj krome abeloj, bambuŝosoj kaj sovaĝaj legomoj.

La nigra urso estas ofte vidata besto en arbaroj de Ĉaju, ĝia viando estas bongusta, la ursaplendo estas rara manĝaĵo kaj ĝia galo estas uzata kiel kuracilo.

### NOKTO SUR ALTA MONTO

Laŭ nia plano ni rajdis de la vilaĝo norden al Azagongla Glacirivero je la lasta tagdeko de julio. Survoje ni vidis en domoj de ĉasistoj felojn de arbaraj moskuloj, nigraj ursoj kaj azenaj antilopoj. La azenaj antilopoj ĉefe troviĝas sude de Jangzi-rivero kaj eksterlande en la sudorienta Azio kaj Hindoĉinia duoninsulo. Pri ilia ekzisto en Tibeto oni ne notis antaŭe kaj ni konstatis tion unuafoje dum tiu ĉi esplorvojaĝo. La vivbezonaĵoj prilaboritaj el iliaj feloj estas solidaj kaj ŝatataj de la lokanoj. Ni trovis ankaŭ rarajn drogajn plantojn *Gastrodia elata* ĉe humidejo en arbaro, pseŭdo-ginsengon (*Panax pseudo-ginseng*), poligonaton (*Polygonatum sibiricum*) kaj aliajn apud vojo.

Post pluraj tagoj ni atingis la lastan vilaĝon antaŭ la glacirivero, por kiun transpasi oni bezonas kvar tagojn. Je la unua tago ni alvenis montdeklivon nomatan Hjuedang. Tie estas granda piceo alta je ĉ. 50 metroj kaj dika je ĉ. 2 metroj. Ĝi estas por ni kvazaŭ pinta verda tendo. Kvankam tiun nokton pluvigis, tamen ni pli ol dek kamaradoj ripozis trankvile sub ĝi.

En la sekvinta tago ni venis al loko alta je 3,120 metroj super la



mar-nivelo. Tie troviĝis neniu loĝanto, ĉie kreskas piceoj, abioj kaj sagbambuoj (*Sinarundinaria nitida*). En arbaro kreskas dika tavolo da musko, kiu similas al elasta tapiŝo. Ni tranoktis sur la montdeklivo. En la loko multas arbaraj moskuloj, ĉar la densaj arbaroj, vasta montregiono kaj abunda akvo liveras al ili abundan manĝaĵon. La mosko, kiun sekrecias la viraj bestoj, estas rara drogo kaj Ĉaju estas unu el la ĉefaj mosko-produktaj lokoj de Tibeto.

Je la tria tago ni daŭrigis la grimpadon de montoj kaj piediris pli ol dek horojn. Kiam ni superpasis la arbaran linion kaj starigis nian



tendon en monta intervalo alta je pli ol 4,200 metroj super la mar-nivelo, blovis frosta vento, en la dua tagdeko de aŭgusto ni trovis nin kvazaŭ en frosta vintro. Ni ĉiuj surportis feltan surtuton kaj lanugan veston kaj tie pasigis frostan nokton sur alta monto.

### TRANSPASO DE AZAGONGLA GLACIRIVERO

Matene, la ora suno leviĝis post la monto. Antaŭ ni montriĝis la Azagongla Glacirivero: La neĝkovritaj montoj alte starantaj unuj post aliaj etendiĝas malproksimen ĝis la ĉielo. Ili estis tre belaj en brilo de la suno. Tiu ĉi glacirivero estas unu el la plej rapid-movaj en la mondo kaj ĉiujare moviĝas 300-400 metrojn. Ĝia lango etendiĝas laŭ montvalo ĝis loko alta je 2,500 metroj super la mar-nivelo kaj sur la montoj ambaŭflanke de ĝi kreskas verdaj arbaroj. La verda arbaro, blanka glacirivero kaj la blua ĉielo formis senkompare belan pejzaĝon.

Sur sterila grundo proksime al la glacirivero kreskas droplanto loka nomata neĝa lotuso kaj sur glacio estas diversaj algoj kaj saltinsektoj (*Collembola*). En degelita akvo vivas glaci-lumbrikoj. Tiel vivipovaj estas tiuj estaĵoj. Kiam ni iris sur la glaciriveron, lirlado de akvo sub glacio estas klare aŭdebla. De malproksime aŭdiĝis fortaj bruoj de lavangoj. Post pokelkaj paŝoj ni renkontis glaciajn fendaĵojn kaj truojn, kies akvo estas tre verda kaj kies profundeco nesondebla.

Post la kvara ptm. ni fine transpasis la glaciriveron. Tie prezentigis alia sceno: Sur malproksimaj montoj estas arbustoj, gruntbovoj maĉas freŝajn herbojn sur montdeklivo, el tendoj de paŝtistoj leviĝas kuirfumo, kalandroj kantas dolĉe, inter arbustoj kaj sur stepoj moviĝas leporoj, marmotoj, montaj koturnoj kaj aliaj birdoj kaj bestoj de altebenaĵo. Ja estas tute alia mondo kontraste kun la silenta mondo de la glacirivero.



## Manuskripto

Fang



Martiro Fang Ĝimin

**E**N la Ĉina Revolucia Muzeo de Pekino konserviĝas la manuskripto de "La Aminda Ĉinio", kiu estas parto de la manuskriptoj de Kamarado Fang Ĝimin skribitaj en malliberejo antaŭ lia martiriĝo. Legante tiujn skribaĵojn, oni kvazaŭ vidas antaŭ si altan figuron de la revoluciulo.

Fang Ĝimin (1900—1935) naskiĝis en Jijang-gubernio de Gianghi-provinco kaj aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio en la jaro 1923. Li estis politika aktivisto de la Partio. La granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ alte taksis la laborojn de li kaj la de

li gvidatan bazlokon en nordorienta Gianghi.

En julio de la jaro 1934, kiel reprezentanto de CK de KPC, Kamarado Fang Ĝimin gvidis la kontraŭjapanan avangardan trupon de la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo en marŝado al norda Ĉinio por rezisti kontraŭ la japanaj agresantoj. La trupo startis de Gianghi kaj trairis la provincojn Fugian kaj Ĝegiang. Kiam ĝi atingis sudan Anhuĵ-provincon, ĝi renkontis sieĝan atakon de Kuomintang-armeo, kies nombro estis sepoblo de tiu de nia avangardo. Kiam la avangardo devigite revenis al la bazloko de la Fugian-Ĝegiang-Gianghi-a Limregiono, Fang Ĝimin kun parto de la trupo ŝirmis la antaŭirantan trupon sekure translokiĝi kaj malfeliĉe estis kaptita de la malamiko post foruzo de sia municio.

Kvankam Fang Ĝimin estis en malliberejo, tamen li ĉiam tenis la patrolandon, la revolucian aferon kaj la Partion en sia koro. Sub lia gvido, la kaptitaj kamaradoj daŭre batalis en la malliberejo kaj aktive preparis eskapon el ĝi. Li ĉiamaniere klopodis por eduki subajn oficistojn de Kuomintang kaj turni ilin en simpatiulojn al la revolucio. Utiligante psikon de la Kuomintang-reakcia aŭtoritato, kiu intencis informiĝi de li pri la revoluciaj bazlokoj, li postulis de la mallibereja aŭtoritato paperon kaj plumon, per kiuj li skribis artikolojn kaj

# Le martiro

## Ĝimin

de SEN KINGLIN

leterojn kun pli ol centmil ideografiaĵoj por malkaŝi la malluman reakcian regadon de Kuomintango kaj resumi sperton kaj lecionojn de la revolucio.

Pro tio, ke ili ne povis ĝustatempe rilatiĝi kun la ekstera partia organizo ilia plano pri eskapo ne efektiviĝis. Malsukcesinte en perfidigo de Kamarado Fang Ĝimin per minacoj kaj allogoj, la malamiko sekrete murdis lin en la sesa de aŭgusto, 1935.

Antaŭ sia martiriĝo li ĉiamaniere klopodis por transdoni siajn artikolojn kaj leterojn skribitajn en la malliberejo al la Centra Komitato de la Partio, por ke la lasta povu informiĝi pri li kaj aliaj kamaradoj en la karcero. Sed, kiu taŭgis por ilin transdoni? Li ekpensis pri Sinjoro Lusin, kiu tiam loĝis en Ŝanhajo. Li skribis al li sekretan leteron per rizkaĉa supo kaj petis iun suban oficiston de la malliberejo turniĝintan al nia flanko transsendi ĝin kaj la manuskriptojn. Kiam ili estis transdonitaj en la manon de Sinjoro Lusin, Kamarado Fang Ĝimin jam martiriĝis. Kun granda indigno kaj malĝojo, Sinjoro Lusin legis la leteron kaj manuskriptojn kaj estis forte kortuŝita de la granda komunisma idealo kaj nobla revolucia kvalito de Kamarado Fang Ĝimin.

En aprilo de 1936, Sinjoro Lusin sukcesis transdoni la manuskriptojn de Kamarado Fang Ĝimin al la


Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio.

Post la Liberigo, la Eldonejo de Popola Literaturo eldonis la verkon de Fang Ĝimin "La Aminda Ĉinio". En ĝi estas kolektitaj la artikoloj "Malriĉeco", "La Aminda Ĉinio" kaj "Postlasitaj Leteroj". En la artikolo "La Aminda Ĉinio" li komparis la patrolandon kun patrino. Kiel oni povas savi la agoniantan patrinon, kiam ŝi suferas tretadon de imperiismo? Post cito de kelkaj nerealigeblaj naci-savaj planoj, li klare montris: "Por sendependiĝi kaj liberiĝi la ĉinan nacion, nenion helpas petegado, genuado kaj larmado, sed oni devas vekti la popolamasojn de la tuta lando al ekpreno de armiloj, al sankta nacia revolucia milito kontraŭ la imperiistoj por forpeli ilin el Ĉinio. Tio estas la unika elirejo por Ĉinio kaj la unika rimedo por savi la patrinon."

En siaj postlasitaj skribaĵoj Kamarado Fang Ĝimin ankaŭ forte

kondamnis tiujn malamikojn, kiuj ŝajne estis potencaj sed esence malfortaj, kaj senkompate vipis la senhontajn perfidulojn, kiuj surgeniĝis antaŭ kaj forvendis sian animon al la malamiko. Li diris: "Rezigni sian originan kredon, disŝiri sian pasintan batalan historion, plaŭde salti en malhelan, fetoran marĉon, aliĝi al ilia bando por kune rabi, ekspluati, subpremi, ĉantaĝi kaj vendi la amindan Ĉinion kaj masakri senkulpajn laboristojn kaj kamparanojn, kaj lasi amikojn ŝpruce sangadi por konservi sian sangon. Ĉu tion oni povus fari? Ha! Se oni povus tion fari, ĉu li ankoraŭ estus homo?! Li estus hundo! porko! bruto! Ne, li estus tio, kion ne volus manĝi eĉ hundo, porko kaj bruto! Oni neniel devas perfidi al la Partio kaj la klaso, neniel." Ĉiu el liaj vortoj estas obuso pafita al la malamiko kaj ponardo ĵetita al la perfiduloj!

Ĉisube estas unu el la artikoloj postlasitaj de Fang Ĝimin.



"La Aminda Ĉinio" kaj "Malriĉeco", manuskriptoj de Fang Ĝimin



## Malriĉeco

**M**I okupiĝis per revoluciaj aktivadoj jam pli ol dek jarojn. En tiu longa batalado mi ĉiam vivis simplan vivon sen luksemo. Mi transpasigis milionojn da juanoj, kaj ĉiu groŝo de la kolektita mono estas uzita por la revolucia afero. Tio estas mirindaĵo por la grandaj sinjoroj de Kuomintango aŭ rigardata de ili kiel bombastajo; sed senegoismo, honesteco kaj sinoferemo por kolektivo ja estas nobla moralo de ĉiu komunisto. Tial, se iu demandus min, ĉu mi havas iom da propra mono ĉe mi, mi povas rakonti al li jenan interesan historieton:

Tio okazis en la tago kiam mi estis kaptita — la plej malfeliĉa tago. Kiam du soldatoj de la Kuomintang armeo trovis min en arbaro kaj divenis, kiu estas mi, ili avide traserĉis min kaj esperis trovi ĉe mi mil aŭ okcent arĝentajn dolarojn, aŭ orajn braceleton kaj fingroringojn, kaj sin riĉigi en la neatendita bonŝanco. Ili pripalpis min de la kolumo ĝis la ŝtrumpaj plandumoj, sed ne trovis eĉ groŝon krom poŝhorloĝo kaj fontoplumo. Ili koleriĝis, suspektante, ke mi kaŝis mian monon ie kaj ne volis ĝin doni al ili. Unu el ili, kun grenado en la maldekstra mano kaj ĝia meĉoŝnuro en la dekstra, faris pozon de ĵeto de la grenado starante kun la disigitaj kruroj. Fiksante siajn okulojn al mi, li minace kriaĉis:

“Tuj elprenu vian monon, alie mi mortigos vin per la grenado!”

“Hm! ne prenu tian malbelan pozon! Mi vere ne havas eĉ unu groŝon. Vi eraras, se vi esperas riĉiĝi per mi,” mi diris senemocie kun rideto.

“Mensogo! Altranga oficisto kiel vi ne havas monon!” diris la soldato kun grenado.

“Vi ne povas ne havi monon, certe vi kaŝis ĝin ie. Mi estas spertulo, vi ja ne povas trompi min.” Dirante tion la alia soldato denove zorgeme palpadis

miajn vestangulojn kaj pantalonfundajon, ĉiam esperante ion trovi.

“Vi devas kredi min kaj ne vane klopodi! Mi ne similas al la altaj oficistoj de via Kuomintango, kiuj ĉiuj havas monon. Hodiaŭ mi havas ja neniun moneron, ĉar ni faras revolucion ne por riĉigi nin!” mi refoje klarigis al ili.

Kiam ili certiĝis, ke nenio estas trovebla ĉe mi, ili ĉesis traserĉadi. Poste ili kun mallevita kapo kaj streĉitaj okuloj traserĉis la lokon, kie mi kaŝis min, sed ankaŭ tie trovis nenion. Kiel ili malesperiĝis! La soldato remetis la meĉoŝnuron en la tenilon de la grenado, sin turnis al mi kaj perforte forprenis miajn poŝhorloĝon kaj fontoplumon. Fine la du soldatoj atingis interkonsenton, ke ili egale dividos inter si la monon akirotan per vendo de miaj objektoj. Ili kelkfoje esploris min per siaj dubemaj kaj miraj rigardoj kaj ordonis unuvoĉe: “Tru!”

Eble iu ankoraŭ volas demandi, ĉu mia familio havas iom da posedaĵoj. Atendi momenton, lasu min iom pensi. Ho, mi ekmemoras, jes, mi ankoraŭ havas iujn objektojn, sed nemultajn. En la pasinta jaro mi donis al mia edzino kelkajn kompletojn da miaj malnovaj someraj ĉemizoj kaj pantalonoj, kaj kelkajn parojn da ŝtrumpoj kun aldonita plandumo, por ke ŝi kaŝu ilin en profunda montaro kaj ne lasu la Kuomintangan armeon forpreni ilin dum atakado. Mi volis elpreni ilin por uzo en somero de la kuranta jaro. Ili estas mia sola havaĵo. Se riĉuloj aŭdus mian mension pri tiuj miaj trezoraj heredaĵoj, ĉu ili ne mokridus min por tri tagoj?!

Malriĉeco kaj pura kaj simpla vivo estas kvalito, per kiu ni revoluciuloj povas venki multajn malfacilojn!

*La 26-an de majo, 1935, skribita en karcero.*

# Flirtas la Ruğa Flago de Daking



La 1205-a Putbora Taĉmento demonstras rapidan putboradon.




La Ĝenerala Petrolkemia Fabriko de Daking-olekampo



Hju Gin (maldekstre), estro de la 1202-a Putbora Taĉmento, eksplikas la manipulado de kotpumpilo por putborado.

Daking-olekampo fundamente konstruiĝis en novtipan olekampon kun industrio kaj agrikulturo en kombino kaj urbo kaj kamparo en kombino, favoran al produkto kaj oportunan por vivo.






Hiong Jali, vicestro de la 1205-a Putbora Taĉmento de Daking, diligente lernas teknikon kaj klopodas plibonigi sian laboron.




Plene ludante sian rolon, la sciencaj kaj teknikaj laborantoj de Daking-olekampo iris multajn bonajn sukcesojn en sciencaj esploroj.




Li Gingjong (fronte), bona kadro tutanime laboranta por la bono de la kolektivo kaj eminenta modelo de la olekampo



Laboristoj zorge studas la brilajn verkojn de Prezidanto Maŭ «Pri Praktiko» kaj «Pri Kontraŭdiro», kaj decidis brave antaŭenmarŝi sub la gvido de Prezidanto Hua alte tenante la Daking-an ruĝan flagon.



Kun la spirito de la Ferulo, laboristoj kaj oficistoj de la Ĝenerala Petrokemia Fabriko plene malkovras kaj ĝisfunde kritikas la vanajn krimegajn klopodojn de la "kvarpersona bando" por restaŭro de kapitalismo.



Yoŭ Ĝan-aŭ, eminenta modelo de Daking-  
olekampo, studas verkon de Prezidanto Maŭ.



Eminenta modelo Li Falan (meze)



Heroaj Daking-aj laboristoj marŝas al nova olekampa regiono.



